

# El Popola Ĉinio

V-19034/1959



det.

## 人民中國報道



1959

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO




## LA ĈINA POPOLO JUNGAS SIAJN RIVEROJN

Kaj grandajn sukcesojn ĝi jam atingis en la pasintaj 10 jaroj. Laŭ nekompleta statistiko, de 1950 ĝis 1958, 71,921,047,000 kubmetroj da ŝtono kaj teraĵo estis fositaj tiucele kaj finkonstruiĝis pli ol cent grandegaj akvomastrumaj konstruaĵoj, kiuj ne nur sekurigis vastajn regionojn de inundo, ebligis irigacii cent milionojn da muoj da tero, sed ankaŭ funkciigis hidroelektrejojn, kies kapacitoj sume atingis pli ol 800,000 kilovatojn. Jen estas bildoj pri kelkaj el la akvo-mastrumaj konstruaĵoj.

1. Hidroelektrejo konstruiĝis en 1956 ĉe Foziling-akvokonservejo, Anhuĵ-provinco, kun riverbaro pli ol 70 metrojn alta.
2. La riverbaro de Mejsan-akvokonservejo, Anhuĵ-provinco, estas 558 metrojn longa kaj 78.24 metrojn alta.
3. La hidroelektrejo ĉe Huangtankoŭ en Ĝegiang-provinco havas kapaciton de 30,000 kilovatoj. Ĝia riverbaro altas 140 metrojn.
4. En junio, 1958 konstruiĝis Mozitan-akvokonservejo, Anhuĵ-provinco, kun riverbaro 204 metrojn alta kaj 330 metrojn longa. Ĝi povas konservi 287,000,000 kubmetrojn da akvo kaj ĝia elektrejo havas kapaciton de 16,000 kilovatoj.
5. Post plialtigo kaj plifortikigo de la riverbaro, la kapacito de Fongman-hidroelektrejo kvarobliĝis atingante 567,000 kilovatojn.

(Fotoj de Hinhua-novajagentejo. Daŭrigo sur p. 191.)





# Sur la tero de la patrio

**D**E post la komenco de la kuranta jaro, ĉie ajn kien vi iras, la du plej aŭdataj vortoj estas "dek jaroj". Kiam infano atingas la dekjaran aĝon, ĝi estas plena de vivforto. Jam pasis dek jaroj de post la renaskiĝo de nia patrio. Nun sur ĝia vasta teritorio ĉie regas vigleco kaj pompeco.

Post la Printempa Festo, mi vojaĝis al kelkaj partoj de la lando, vizitante iujn fabrikojn, vilaĝojn kaj urbojn, kaj preterpasante multajn aliajn. Kaj mi ricevis ĝeneralan impreson, ke ĉio fluge progresas kaj rapide aliformiĝas. Ŝanĝiĝas la homa ideologia fizionomio, ŝanĝiĝas la aspekto de la vidaĵoj sur la tero, ŝanĝiĝas

la rilatoj inter la homoj kaj ankaŭ tiuj inter la homoj kaj la naturo.

Komence de la printempo, mi havis okazon saluti la garnizonojn de la mardefendo kaj la fiŝkaptistajn fratojn sur insuloj apud la orienta marbordo. Mi restis tie nur dek tagojn, sed la impresoj estas por mi malfacile forgesebla. Antaŭ la liberiĝo, sur tiuj insuloj tiranis la banditoj kaj la "gestapoj" de Kuomintang, kaj tie vivantaj fiŝkaptistoj havis terure mallumajn tagojn. Ili nomis siajn insulojn "montoj malriĉaj, akvo sovaĝa". Nun ili jam levis la kapon kaj ĉio aliĝis. Antaŭe, ili kaptis fiŝojn nur en du sezonoj de la jaro, sed nun, en ĉiuj kvar. Antaŭe neniu el la virinoj iris labori sur la maro; nun ili tion faras amase. Antaŭe, sur la insuloj la tero ne estis kulturata, kaj nun, el la valoj aperis akvo-konservejoj kaj la montdeklivoj estas verde tapiŝitaj. Antaŭ la liberiĝo, la fiŝkaptistoj ofte estis devigataj vendi siajn infanojn, forlasi sian edzinon kaj disigi sian familion pro la mizereco. Sed hodiaŭ, ĉiuj insuloj havas siajn popolajn komunumojn, komunajn manĝejojn, elementajn lernejojn, infanvartejojn kaj kuracejojn. Ridoj radias sur la vizaĝoj de la loĝantoj. Okazis profundaj ŝanĝiĝoj ankaŭ en la interhomaj rilatoj. Antaŭe la edzo insultis la edzinon: "Kiel fatala por la ŝipo la rekt-kontraŭa vento, tiel malbona por la viro litdiablino." La virinoj estis ĉiam tiel malfeliĉaj. Kaj nun, kia harmonio regas en la komuna manĝejo kie manĝas tutaj familioj: viroj kaj virinoj, plenaĝuloj kaj infanoj, kune sidantaj ĉirkaŭ tabloj! Kaj kia vigleco estas sur la placo, kie ili kune rigardas spektaklojn! Oni facile imagas: kian energion ili devus havi en la laboro!

En Ŝanhajo, mi vizitis kelkajn fabrikojn. La industriaj bazoj en la antaŭurbo, provizitaj per serio da fabrikoj de metalurgio, maŝinaro, elektraj motoroj, k.c., ŝajnas novaj urboj. La nove konstruita laborejo de iu fabriko de kaldronejoj estas pli granda ol la tuta fabriko starigita de eksterlandaj kapitalistoj imperiismaj en la pasinta tempo. Ĉi tie oni fabrikas jam hidraŭlikajn premilojn de miloj da tunoj kaj vaporajn turbinojn de dekmiloj da kilovatoj. Antaŭe, tiajn altkvalitajn gigantaĵojn oni ricevis nur importante, tamen nun,

## EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto  
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

### Enhavo de N-ro 5 (56), 1959

Ĉi tiu numero enhavas 12 kromajn paĝojn por celebri la 10-jaran Nacian Feston de Ĉinio.

*Bildo sur la kovrilo — Ĉie Pompas Floroj*  
(Pentris Ju Fej-an, k.a.)

**Plenumo de kvinjara plano en du jaroj**  
**La kreskado de scienca studentaro en Ĉinio**  
**10 jaroj de Kajluan-karbominejo**  
**Dekjara konstruado de agra akvoutiligo**  
**60 jaroj de unu strato en Pekino**  
**Junularo kuraĝa por fari ĉion**  
**Nova etapo de la virina movado en Ĉinio**  
**Hieraŭ**

*Bildo sur la dorsa kovrilo — Lerta Knabino*  
**Brodas Flormonton** (Pentris Ŝi Lu)

ne nur la grandaj fabrikoj ilin produktas, sed ankaŭ la malgrandaj, kiuj havas nur ĉirkaŭ cent laboristojn, ekproduktas kolosajn maŝinojn, laŭ la mirinda maniero nomata "Ostorodado de Formikoj". Tio estas rezulto de la granda antaŭensalto pasintjara en socialisma konstruado, la liberiĝo de penso, disrompiĝo de superstiĉoj kaj la kuraĝo en pensado kaj agado de la granda amaso. Krom altkvalitaj maŝinegoj, Ĉinio ankaŭ produktas fabrikajn precizajn kaj plej novajn laŭ la nuna scienca atingo. En brakhorloĝa fabriko ni vidis vicojn da laboristoj procedantaj unuj post aliaj en kontinua fluo. Multaj el ili estis junuloj. Silente kaj bonorde manipulante delikatajn instrumentojn, ili prilaboris aŭ muntis metalajn lametojn kaj ŝraŭbetojn, apenaŭ videblajn per la okuloj. La laborejo, moderne ekipita, estis tiel pura, ke ĝi ne lasas eĉ polvereton tuŝi la precizajn aparatojn. Tia industrio ekzistas de ne pli ol du aŭ tri jarojn en nia lando, sed ĝi jam produktas tre ekzaktajn produktaĵojn. Pasintjare la fabriko faris pli ol cent mil brakhorloĝojn; en la jaro kuranta, la laboristoj de la fabriko diris al ni kun fiero, ke laŭplane ili devas produkti 350,000, sed ili klopodos superi la nombron de 400,000.

Por plenumi la planitajn ciferojn de la ĉijara antaŭensalto, la alloga lozungo de Ŝanhajaj laboristoj estas "Ne pli da laborantoj, sed pli da produktoj!" Kiel tion do efektivigi? Per penado kaj sagaco—per renovigo de la tekniko. Mi faris viziton al ŝipkonstruejo, kiun mi vizitis antaŭ unu jaro. Tiam oni estis plivastigantaj la teronon,

plenigante la kavajojn sur la grundo. Sed ĉifoje, ni vidis jam ŝipkorpojn laŭorde vicigitajn en la doko, kie la laboristoj plenenergie tintante laboris. Kio plej interesis nin estas la grandskala kampanjo de teknika renovigo de la ŝipkonstruistoj. Kelkaj junaj laboristoj fervore montris al ni diversajn kreaĵojn kiujn ili elfaris kune kun siaj maljunaj majstroj. Ekzemple, la laboristoj de kupraja laborejo kreis maŝinon, kiu povas kurbigi ŝtalan tubon sen antaŭvarmigo kaj helpas plialtigi la produktan efikon je kelkdek fojoj. La ĉarpentistoj aldonis kvar tranĉilojn al la maŝino, kaj ses tranĉiloj samtempe laboras, reduktante la produktajn procedojn. Tio ankaŭ multe plialtigis la laborefikon. Ĉio ĉi tio estas tamen nur komenco de la teknika renovigo. Ni devas atenti, kiom grandan rolon ludas la spirito de malcedema kaj senlaca penado kaj la progresema penso kuraĝa por venki ĉiajn malfacilojn, kiel montrata en la dramo "Homoj kuraĝaj pensi kaj fari", ĉie en miloj kaj miloj da fabrikoj, minejoj, kampoj, laborejoj kaj ankaŭ laboratorioj tra nia lando.

Lasttempe dum vojaĝo mi trapasis la sudokcidentan landparton. Kvankam mi nur rapide trapasis, tamen la grandioza bildo lasita en mi estas ege entuziasmiga. Miljaraj urboj ĉiutage ŝanĝas sian antikvan fizionomion en ĉiam pli belajn kaj novajn trajtojn. De Kunming ĝis Tajĵuan, en ĉiuj urboj aperadas larĝaj stratoj, altaj konstruaĵoj, grandaj fabrikoj. La montojn trape-ntrantaj fervojoj kaj la fortikaj altensiaj elektraj fadenoj portadas al la altebenajoj de sudokcidento kaj nordokcidento senfinajn kaj potencajn vivofortojn. En Kunming mi vizitis dum mallonga tempo muzeon de nacioj, kiu donis al mi la plej profundan impreson. Oni povas vidi en ĝi kiel ĝoje kaj feliĉe vivas ĉiuj naciaj malplimultoĵoj en la harmonia kaj unuigita patria familio post la liberiĝo. Tio estas ĝuste la plej forta respondo al la lasttempa ribelo de la plenmano da Tibetaj reakciuloj de la alta socitavolo kaj al la kalumnioj de la imperiistoj.

De la bordo de la Orienta Maro ĝis la sudokcidenta altebenajo, en ĉiu angulo de

Jungado de la Flava Rivero

Lignogravuraĵo de Li Hua



la patria tero, ĉio spertas ŝanĝojn senprecedencajn. La fragmentaj sed profundaj impresoj, kiujn mi ricevis en dumonata vojaĝo, pravas la jenon: la ŝanĝiĝo de la homo estas la fundamento, de kiu

originas ĉiuj ceteraj ŝanĝiĝoj. Ĉe ni, la homo jam fariĝis mastro de la maŝinoj, de la naturo, kaj vera mastro de sia propra sorto!

Fang King:

## Plenumo de kvinjara plano en du jaroj

Mil barkoj vete startas, dek mil arboj konkure prosperas: tiel statas la ekonomia situacio de Ĉinio. La tuta popolo brave antaŭenmarŝas, laŭ la vojo montrita de la 8-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, por atingi ĉijare la ĉefajn celojn de la 2-a Kvinjara Plano je tri jaroj pli frue antaŭ la difinita tempo. Tiu ĉi ekonomia situacio altiras la atenton de la mondo. Fama japana specialisto pri ĉinaj problemoj, s-ro Iŭamura Miĉio opinias ke la ĉina popolo sukcesos efektiviĝi la alvokon de ĈKP. Li diris: "Se la 2-a Kvinjara Plano estos plenumita antaŭ la jarfino de la kuranta jaro, tio havos epokfaran signifon por la ekonomia evoluo de Ĉinio, kaj influos ankaŭ profunde kaj daŭre la ekonomion de Azio kaj de la mondo."

Certaj ĉefaj taskoj kaj celoj de la 1-a Kvinjara Plano (1953-1957) estis plenumitaj aŭ superplenumitaj en 1956, unu jaron pli frue ol la difinita tempo. Dank' al la superplenumo de la 1-a Kvinjara Plano, estas solide fundamentita primare la industriigo de Ĉinio. Tiam multaj eksterlandaj amikoj hurais al tiu granda sukceso. Kaj nun Ĉinio plenumos la ĉefajn celojn de la 2-a Kvinjara Plano ĉijare, je tri jaroj pli frue, kio signifas ke la ekonomia evoluo de Ĉinio fariĝas ankoraŭ multe pli rapida! Kompreneble tio estas grandega ĝojiga novaĵo por la amikoj tra la tuta mondo, kiuj zorgas pri la progresado de nia lando.

Plenumi taskojn por 5 jaroj en 2—estas afero verŝajne ne kredebla, kaj iuj ekdubas, ĉu ne la celoj de la 2-a KJP estas eble pli malaltaj kaj, sekve, pli facile atingeblaj.

Sed la ĉefaj celoj de la 2-a Kvinjara Plano, proponitaj de la 8-a Kongreso de ĈKP en septembro de 1956 kaj akceptitaj de la Ŝtata Konsilo en februaro de 1957, estas multe pli altaj ol tiuj de la 1-a. Tion bone montras la jenaj ciferoj pri la kreskado de ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj produktoj:

### la 1-a Kvinjara Plano      la 2-a Kvinjara Plano

	produkto efektiva	kresko kompare al	produkto celita por	kresko celita kompare al
	1957	1952	1962	1957
ŝtalo*	5.35	4.00	10.50-12.00	5.15-6.65
karbo*	130.00	63.51	190.00-210.00	60.00-80.00
metal- tranĉaj maŝinoj†	28,000	14,300	60,000-65,000	32,000-37,000
Koton- ŝpinaĵo‡	4.65	1.03	8.00-9.00	3.35-4.35
greno*	185.00	30.60	250.00	65.00
kotono*	1.64	0.34	2.40	0.76

Laŭ la postulo de la 2-a KJP, la tuta produktvaloro de industrio, devas kreski ĉirkaŭ 100%, kaj tiu de agrikulturo ĉirkaŭ 35%. La postulata rapideco de kreskado estas sufiĉe alta kaj vekis en okcidento miron kaj dubon pri ĝia efektivebleco. Evidente la 2-a KJP publikigita antaŭ tri jaroj estas plano grandioza.

Sed, kiel eblas, ke tiu grandioza plano nun estos plenumita, antaŭtempe, en du jaroj? La kialo kuŝas en tio, ke la situacio de la antaŭensaltego de ekonomia konstruado, komencita en 1958 kaj ankoraŭ ĉiam daŭre evoluanta, multe pliigas ĝian rapidecon.

En 1958, la unua jaro de la 2-a KJP, ĉina popolo multe levis sian socialisman konscion, post la tutnacia rektifa kampanjo. Sur bazo de tio kaj laŭ la orientado de la ĝenerala linio de la socialisma konstruado elmetita de CK ĈKP, kreiĝis la stato de ĉiufanka antaŭensaltego en socialisma konstruado tra la tuta lando. En tiu jaro, la tuta produktvaloro industria atingis 117,000 milionojn

\* En milionoj da tunoj.

† En unuoj (Ekskluzive de la simplaj).

‡ En milionoj da pakaĵoj, kiuj pezas po 181.44 kg. aŭ 400 funtoj anglaj.



da juanoj, kun pliiĝo de 66%, kompare kun tiu de 1957; la produkto de ŝtalo atingis 11.08 milionojn da tunoj, inter kiuj 8 milionoj da tunoj estas produktitaj laŭ moderna metodo kaj 3.08 milionoj laŭ indiĝena metodo, kaj la produkto de "ŝtalo moderna" kreskis je 49.5% kompare kun la produkto de 1957; la produkto de karbo estis 270 milionoj da tunoj, t.e. pli ol duoblo de 1957. Koncerne al la agrikulturo, laŭ la lasttempa reĝustigo de la Ŝtata Statistika Oficejo, la tuta produktvaloro estis 67,100 milionoj da juanoj kun kresko de 25%, kompare kun tiu de 1957, kaj la produkto de greno atingis 250 milionojn da tunoj, kun kresko de 35%, kaj tiu de kotono atingis 2.1 milionojn da tunoj, kun kresko de 28%. Krom ŝtalo, karbo, greno kaj kotono, ankaŭ aliaj produktoj industriaj kaj agrikulturaj, kaj transportaj, komunikaj, kulturaj, edukaj k.a. entreprenoj ankaŭ disvolviĝis grandmezure. Kaj dank' al la antaŭensaltego, la celitaj produktkvantoj de karbo, ligno, salo, greno, de la 2-a KJP, fakte jam estis atingitaj en 1958, en daŭro nur de unu jaro.

En la kuranta jaro la situacio de antaŭensalto de ĉina ekonomio daŭras. Ni komparu la unuan duonjaron de ĉi tiu jaro kun tiu de la pasinta jaro: La tuta produktvaloro industria kreskis je 65%. La fervoja transportado kreskis je 49%. Koncerne al agrikulturo, kvankam la semita areo iom malpliiĝis en lasta vintro kaj ne malmultaj lokoj suferas gravan superakvegon kaj sekecon, sed la tuta rikolto de tritiko, frua rizo kaj aliaj diversaj grenoj kune tamen atingis 69.5 milionojn da tunoj. Kompare kun la senprecedenca riĉa rikolto de la lasta somero (68.25 milionoj da tunoj) ĝi superis la lastan je 1.25 milionoj da tunoj. Tiuj grandaj, jam akiritaj atingoj ja formas solidan fundamenton por efektiviĝi la ĉefajn celojn de la 2-a KJP, je tri jaroj pli frue.


"Oni povas nur diri, ke iliaj celajoj kaj plano estas mirindaj. Kaj la dato de efektiviĝo de tiuj aspiroj estos multe pli frua ol tiu laŭ la origina plano." Jen estas la rimarkigo pri la produkta plano de Ĉinio, farita de la ses anglaj ministoj el York, kiuj vizitis Ĉinion lastjare. Same kiel ili, ankaŭ jesigis kaj laŭdis la antaŭensaltegon de Ĉinio alilandaj amikoj, kiuj persone vizitis la landon.

Kaj nun la ĉina popolo levas novan tajdon de produktpliiĝo kaj ekonomi-praktikigo, kun pli entuziasma fervoro. Informoj pri produktaj sukcesoj svarmas kvazaŭ printempaj hirundoj en la vasta ĉielo de Ĉinio; kaj la orienta vento portos al la tuta mondo la novaĵon pri la nova venko de la ĉina popolo—antaŭplenumo de la ĉefaj celajoj de la 2-a KJP, je tri jaroj pli frue.


## GRANDAJ PAŜOJ

de  
Nova Ĉinio  
en Industrio kaj  
Agrikulturo


### ŜTALO




### KARBO



### GRENO



### KOTONO



\* La plej altprodukta jaro antaŭ la liberigo en 1949.

**Ke-gan :**

# La kreskado de scienca studentaro en Ĉinio

La sciencaj laboroj en Ĉinio, same kiel ĉiuj fakoj de la nacia ekonomio, disvolviĝis sur la bazo tre mizera kaj postrestinta. Oni povas diri, ke dum la reakcia regado de Kuomintang-o, la situacio de sciencaj laboroj estis tute malvigla, mizera kaj kompatinda. Kvankam multaj talentaj scienculoj iam ankaŭ ion atingis, sed neniu ilin subtenis; kaj cetere, pro malmulteco de ilia nombro kaj manko de favoraj laborkondiĉoj, ili neniel povis realigi siajn aspirojn malgraŭ plenkora fervoro, kaj iuj eĉ devis forlasi sian korinklinon kaj fakkonon, rezignante la idealon sindediĉi al la scienca laboro en Ĉinio por okupi sin en aliaj laboroj aŭ forveturi al fremdaj landoj por tie daŭrigi sciencajn studadon aŭ labori kiel profesoro.

Kiam la Ĉina Scienca Akademio fondiĝis en novembro de 1949, ĝi transprenis el la manoj de la reakciaj regantoj de Kuomintang-o, nur dudek kelkajn stud-organizaĵojn apartenantajn al la antaŭaj Centra Akademio kaj Pejping-a Akademio, kun personaro de iom pli ol 600 entute en 1948. La Instituto de Fiziko de la Centra Akademio tiutempe havis nur dudek kelkajn laborantojn, inkluzive studentojn, tiu de Pejping-a Akademio havis nur ses studentojn kaj la Instituto de Kemio de la sama havis nur dekdu studentojn. Kompatinde malmultaj estis libroj, instrumentoj kaj aliaj ekipaĵoj.

Post la liberiĝo en 1949, la Ĉina Scienca Akademio, kiel la centro de scienca studado en la tuta lando, saltege disvolviĝis. Nun ĝi jam havas pli ol sepdek stud-organizaĵojn sub sia rekta kontrolo, kaj ĉirkaŭ kelkaj dek institutoj estas en preparado kaj konstruado. Kaj en 26 provincoj aŭ urboj estas fonditaj lokaj branĉoj de la akademio. Nun la personaro de la Ĉina Scienca Akademio kalkuliĝas per dekmilo, kaj kompare kun 1949, ĝi plimultiĝis pli ol sepdekoble. La studfakoj pri novaj teknikoj en dinamiko, elektroniko, kalkultekniko, aŭtomatigo ktp. kvankam fonditaj antaŭ nelonge, jam nun fariĝis grandaj studcentroj havantaj kelkcent ĝis kelkmil laborantojn.

## *Disvolviĝo ambaŭ en kvalito kaj kvanto*


La sciencaj laboroj ne nur plimultiĝis en nombro de laborantoj, sed ankaŭ progresis sen-

precedence en scienca nivelo kaj laborrezultoj. Multaj maljunaj scienculoj kiuj sub la pasinta reakcia reĝimo ne povis plene elvolvi sian talenton, estas laborantaj nun per sia tuta intelekto kaj sinforĝesa fervoro, super gravaj sciencaj studoj, kaj prenis sur sin la taskon kulturi grandkvantan novicaron sciencajn. Multe da junaj sciencaj laborantoj, post obstina lernado, tre rapide ellernis la ĝisnunajn rezultatojn de sciencaj esploroj, elvolvis sian kreaĵan talenton kaj donis rimarkindan rezultaton.

Sub la helpo de Sovetunio, la unua atoma reakciilo en nia lando jam komencis sian laboron. Tio signas la enpaŝon de Ĉinio en la epokon de atoma energio. En la sfero de la studado pri duonkondukantoj, ni, en iuj gravaj flankoj, enviciĝis inter la progresintaj landoj, en la mondo. Iuj niaj studadoj pri precizaj optikaj instrumentoj ankaŭ atingis la internacian progresintan nivelon. Kiel rezulto de studado kaj kreado en la sfero de elektrona kalkulmaŝino, dum mallongaj du, tri jaroj, jam aperis en nia lando la unua kompleto memfarita. La rezultatoj de la studado en metalurgio, kemio, biologio, geologio ktp, ne nur ludis gravan rolon en la socialisma konstruado de nia lando, sed ankaŭ pliriĉigis la sciencajn trezorojn de la mondo.

## **La unua eksperimenta nukleona reakciilo de Ĉinio**

*Foto de Li Gi-ju*



Krome, multe da grandaskalaj sciencaj laboroj estas rapide progresantaj. Kiel ekzemple, la Ĉina Scienca Akademio organizis kune kun aliaj industriaj fakoj multajn kompleksajn kaj specialajn esplorgrupojn kiuj faras esploradon sur la bela, riĉa kaj vasta lando—de la insulo Hajnan en la sudo, ĝis Hejlonggiang-provinco en la nordo, kaj de la Orienta Maro kaj la Flava Maro en la oriento ĝis la provincoj Hingiang kaj Kinghaj en la okcidento—por ke ni povu ekspluati la riĉan subteran trezoron de nia lando. Pli ol mil scienculoj partoprenis la esploradon. Plie, oni jam komencis la sciencajn studojn por ŝanĝi la sekan klimaton de nia nordokcidenta regiono, por konkeri la vastan dezerton kuŝantan en la provincoj aŭ aŭtonomaj regionoj: Hingiang, Kinghaj, Gansu, Interna Mongolio ktp, por solvi la gravajn taskojn de la Trimontgorĝa akvomastroma konstruaĵo de Jangzrivero, kiu estos unu el la plej grandaj konstruaĵoj en la mondo, kaj por multaj aliaj taskoj.

### *Marŝo al la progresinta nivelo de scienco*

Evidente, ne eblas al ni prezenti ĉiujn laborrezultatojn, kiujn la Ĉina Scienca Akademio akiris en diversaj flankoj. En 1958, sole la studaj institucioj de la Akademio troviĝantaj en la teritorio de Pekino kune solvis 972 problemojn de sciencaj studoj dediĉe al la festo de “Julio la Unua”,\* el kiuj 107 jam atingis aŭ superis la internacian nivelon. Okaze de la nacia festo de 1958, la sumo plimultiĝis eĉ ĝis 2153, el kiuj 232

**Kampano-agronomo Cuj Ĝu-song (maldekstre) membro de la Agronomia Akademio de Ĉinio studanta pri kulturado de rizplanto.**  
Foto de Liu En-taj



atingis aŭ superis la progresintan nivelon de la mondo.

La supre menciitajn atingojn ni dankas ĉefe al la supereco de nia socialisma socisistemo kaj la granda zorgemo kaj subteno, kiujn la Partio kaj la registaro ĉiam donas al la sciencaj laboroj. Ekzemple, la jara buĝeto por la Ĉina Scienca Akademio en 1959 plimultiĝis 80-oble kompare kun tiu de 1950. La registaro montras ĉiam grandan helpemon kaj zorgemon pri la viv- kaj labor-kondiĉoj de la scienculoj. La popolo havas sian grandan fidon al la scienculoj, ekzemple, tridek sep el la studentoj de la Ĉina Scienca Akademio estas elektitaj kiel la reprezentantoj en la Nacia Popola Kongreso.

La rapidega progreso de la ekonomia konstruado, la disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo, la plialtiĝo de popola vivnivelo en la lando, starigas multajn novajn taskojn al la scienculoj, kaj samtempe ankaŭ prezentis al ili vastan kampon por disvastigi kaj utiligi la rezultatojn de ilia scienca studado.

En la disvolvo de la sciencaj laboroj en Ĉinio, Sovetunio donis al ni malegoismajn helpojn; grandanime liveris al ni diversajn sciencajn dokumentojn, helpis nin starigi novajn studfakojn pri kiuj al ni mankis la kondiĉoj por komenci la laboron kaj edukis por ni grandnombron da kadroj por formi la necesan sciencajn studentaron. Ĉio ĉi tio ludis gravan rolon en la progresado de ĉinaj sciencaj laboroj.

### *Grandaj klopodoj por kulturi sciencajn laborantojn*

Por pli rapide disvolvi la sciencajn laborojn en nia lando, la Ĉina Scienca Akademio faras sian plejblon por kulturi grandan nombron da novaj sciencistoj fakistoj. Por tio en 1958 estis fondita la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato. Tiu novtipa universitato celas eduki specialistojn de la plej modernaj sciencoj. Ankaŭ la lokaj branĉoj de la Akademio kaj ĉiuj ĝiaj fakaj institucioj klopodas per ĉiuj siaj fortoj kaj latentaj eblecoj kulturi kadrojn sciencajn. Iuj lokaj branĉoj kaj fakaj institutoj jam malfermis diversitipajn lernejojn, kies studentoj,




fininte siajn kursojn, fariĝos novaj fortoj de la koncernaj studfakoj.

### *Inventado kaj kreado de popolamasoj*

Krom la sciencaj laborantoj en la Ĉina Scienca Akademio, la profesoroj kaj studentoj de universitatoj, kaj altlernejoj, kaj la multnombraj studentoj kaj teknikistoj de diversaj industriaj branĉoj ankaŭ fariĝis la grava konsistparto de nia scienca studentaro. Sub la politiko de "kunligo de instruado-lernado, produktado kaj scienca studado", ili plenforte sin okupas en sciencaj studadoj, kaj jam akiris mirindajn rezultatojn.

Krome atentindaj estas kreemaj inventistoj el la sescent milionoj da popolanoj. Ekzemple, la simpla kamparano Vang Baŭ-ging mem fondis novan fakon en scienco, nome projektado de kampkulturado; Kiang Ŝaŭ-fang, kiu lernis en mezgrada lernejo nur unu jaron kaj duonon, rompita la tradician koncepton pri la kulturado de plantoj, kaj malfermis novan vojon de tiu ĉi fako. Tiaj kreemaj inventistoj aperas en miloj. La senlima intelekto de la liberigita popolo nepre malfermos novan paĝon de niaj sciencaj laboroj.

*\* Fondiĝa tago de Ĉina Komunista Partio.*



Panoramo de Hicun-minejo de Kajluan-karbominejo

*Foto de Ŝi Pan-ki*

***Vu Da :***

# ***10 jaroj de Kajluan-karbominejo***

**J**AM pasis dek jaroj depost la liberiĝo de Kajluan-karbominejo!


Ĝi situas en la orienta parto de Hebej-provinco, estas konata kiel unu el la plej grandaj karbominejoj en Ĉinio jam en la pasinteco, sed dum 48 jaroj, ĝi estis ekspluatata de la anglaj kapitalistoj.

Nelonge post la liberiĝo, s-ro Pryor, la angla ĝenerala direktoro de la minejo antaŭdiris arogante ĉe sia forlaso: "Ĉu vi, ĉifonuloj kun truitaj ŝuoj, ankaŭ kapablus administri karbominejon? eĉ post 10 jaroj vi ne povos reveni al la malnova prospera stato!" "Sen ni certe venos la fino de la minejo en tri monatoj." Sed ve al s-ro Pryor kaj liaj kunuloj, nun post dek jaroj

ne nur ne venis la fino de la minejo, sed kontraŭe, la karboproduktado, la konstrua skalo, la teknikaj ekipaĵoj kaj administrado, ĉio ĉi tio multe superis tiujn de la malnova Kajluan-minejo en la tempo, kiam ĝi estis en la manoj de anglaj kapitalistoj. La meza jarprodukto de Kajluan-karbominejo neniam superis 4 milionojn da tunoj dum la 48 jaroj, depost 1900, kiam ĝi falis en la manojn de la angloj, kaj la produktado ĉiam stagnis; sed nun, sole la produkto en 1958 atingis jam 12,500,000 tunojn.

### **Malnovaj ŝaktoj retrovis sian junecon**

Kajluan-karbominejo sin etendas laŭlonge de la Pekin-Ŝanhajguan-a Fervojo. La tuta regiono



**Karboministo en Tanggiaŝuangminejo fosas karbon per hidraŭlika metodo.**

*Foto de Ŝeng Guo*

ampleksas ĉirkaŭ mil kvadratajn kilometrojn. Antaŭe la geologoj asertis, ke la tuta karbo-provizo de tiu ĉi minejo ne superas 300,000,000 tunojn, maksimume ĝis 1,000,000,000 tunoj kaj ĝi elĉerpiĝos post 70 jaroj laŭ siatempa skalo de ekspluatado. Sed nun 81 jaroj jam pasis, en la minejo sin trovas ankoraŭ tre riĉa karboprovizo. Ĝi eĉ sufiĉos por pliaj 300 jaroj laŭ nuna produktonivelo.

Kiam Kajluan-minejo revenis en la manojn de la ĉina popolo en fino de 1948, la malnovaj ŝaktoj retrovis ankaŭ sian junecon. En lastaj 10 jaroj ili ĉiuj estis aŭ plene rekonstruitaj aŭ plivastigitaj. La ŝakto ĉe Magiagouŭ detruita de la imperiistoj antaŭ pli ol 20 jaroj, estis rekonstruita post la liberiĝo el la ruino plene kovrita de sovaĝaj herbaroj, kaj fariĝis jam tute mekanikigita moderna ŝakto. Novaj ŝaktoj estas konstruataj en multaj lokoj en la regiono, por kontentigi la bezonojn de disvolviĝanta industrio.

### **De primitiveco al modernigo**

En la tempo sub administrado de la anglaj kapitalistoj, la produktan procedon de tiu ĉi minejo karakterizis primitiveco kaj rabemo. Tute tiaj estis la produktiloj. Oni dehakis karbon per pioĉoj kaj ĝin transportis per korboj, puŝĉaroj; traboj estis transportataj ŝultre. Nun tie estas tute alia sceno: sur la alta ponto ĉe la aperturo de la ŝakto kuradas unu post alia aŭtomataj transportaj veturiloj, anstataŭ ĉaroj kun ŝarĝo de duontuno da karbo puŝataj de laboristoj, kiuj konkuras kontraŭ la rapida levado per mekanika forto; anstataŭ transportado per korboj de la duonnudaj laboristoj, nun funkcias jam elektraj veturiloj; malaperis la sceno, ke oni riskante sian vivon elporti karbon el la malnovaj jam

malplenigitaj minejoj. Krome, la karboministoj nun ekuzas progresintajn instrumentojn, kiaj kombajno, karbotranĉa maŝino, pneŭmatika borilo k.a. La mekanikigo de la karbfosado en la minejo jam superis 90%.

Precipe notinda estas tio, ke Kajluan-minejo nun preparas sin por alpreni la plej novan teknikon de karboekspluatado en la mondo—t.e. la hidraŭlika metodo kaj la unua hidraŭlik-

metoda ŝakto estas jam finkonstruita. Ĝian disvastigon en la tuta minejo oni nun energie entreprenas.

### **Sekureco en ŝakto garantiata**

La ŝanĝo de la sekurigaj kondiĉoj interne de la minejo donis al ni neforgeseblan impreson. Antaŭe la angloj zorgis nur pri ekspluatado al la

He Gi-feng, vicministro de agrikulturo:

## **Dekjara Konstruado**

*Supere ne estas ĉiela reganto,\*  
surtere ne estas di-draka giganto;\*\*  
mi mem la ĉiela reganto,  
mi mem la di-draka giganto.  
Vi, ĉiuj montegoj, voj-cedu,  
ke mi plu impetu!*

Supre estas popolkanto, kiu disvastiĝis lastjare inter la popolanoj dum la fluso de konstruado de agraj akvo-utiligoj en Ĉinio. Ĝuste kun tia heroismo kaj verveco la 500 milionoj da ĉinaj kamparanoj translokiĝis montojn por konstrui lagojn aŭ trahakis rokegojn por konduki riverojn, efektive la planon de grandskala konstruado de agraj akvo-utiligoj. Nuntempe en multaj lokoj kanaloj serpentumas sur montoj kaj rizkampoj troviĝas sur altebenajoj. Sur multaj sekaj montdeklivoj fariĝis rikoltodonaj valoj kaj la ofte superakvataj aŭ alkalecaj grundoj fariĝis riĉaj grenejoj. La feliĉa vivo en kiu "sekeco aŭ malsekeco fariĝas laŭ la homa volo; malabundo aŭ

## Veraj mastroj de la minejo

Post la liberiĝo, la “ĉifonuloj kun truitaj ŝuoj” iam tiel nomitaj de la fremdaj kapitalistoj fariĝis veraj mastroj de la minejo. Multe da tiamaj ministoj estas promociitaj al la gvidaj postenoj. De 1952, jam pli ol 3,400 ministoj fariĝis kadroj administraj, kaj ĉiuj eminente plenumas siajn taskojn.

Fundamente ŝanĝiĝis ankaŭ materia kaj kultura vivoj de la laboristoj. Ili ĝuas abundan vivon. Ĉiujare grandan sumon asignis la registaro por konstruado de multaj loĝejoj, hospitaloj, infanvartejoj, sanatorioj kaj kluboj. Nur en lastaj dek jaroj la nombro de nove konstruitaj loĝejoj jam superis tiun de la pasintaj sepdek jaroj ĉe Kajluan-minejo. Antaŭe 90% el la ministoj estis analfabetoj, sed nun ĉiuj junuloj kaj plenkreskuloj jam scipovas legi kaj skribi ankaŭ parto de la maljunaj ministoj forĵetis de si la etiketon de “analfabeto”.

En dek jaroj Kajluan-karbobinejo, same kiel ĉie en la lando, ŝanĝiĝis de fundamento. En la nuna jaro ĝiaj 50,000 laboristo-oficistoj denove sin jetas impete en novan karboproduktan lukton. Ili promesis, ke ili altigos la tag-produkton je 20% pli ol tiu en la lasta jaro.

laboristoj, sed estis tute indiferentaj pri ilia vivsekureco. La ministoj laborantaj subtere en kelkcent-metra profundeco, ne havis freŝan aeron pro ne sufiĉa ventolado. Kontraŭe en la galerioj, amasiĝis ofte malutilaj gasoj, kaj tio kaŭzis ne nur ofte sufokiĝon ĉe la laboristoj, sed ankaŭ plurajn gaseksplodojn en kiuj granda nombro da ministoj perdis sian vivon. Tial ili nomis la minejon “vojo al alia mondo”. Post la liberiĝo, sole en periodo de la unua kvinjara plano (1953-1957) nove kaj ree konstruiĝis 7 grandaj aerumaj ŝaktoj, oni nove konstruis pli ol 23,000 metrojn da konstanta vento-kanalo kaj plivastigis pli ol 15,000 metrojn de la malnovaj. Sufiĉan freŝaeron oni jam nun povas ricevi subtere, kaj dank’ al tio fundamente malaperis minaco de gaseksplodo. En la laboro de polvoforigado Kajluan-minejo estas la unua premiita per ruĝflago.

La tutan ŝanĝon plej bone komprenas la familianoj de la laboristoj. Ili diris: “En la pasinteco, maltrankvilo ekkaptis nin, kiam oni ne vidis revenon de niaj parencoj post la deĵoro, kaj kun larmoj sur vangoj, rapidis al la minejo por vidi kio okazis. Sed nun, en tia okazo ni restas trankvilaj, ĉar ni bone scias, ke li aŭ lernas aŭ kunvenas.”

---

## de Agra Akvo-utiligo

senrikolto, ekster la homa kono”, revita de niaj prauloj dum kelk mil jaroj, estas paŝon post paŝo efektivigata en plej granda parto de nia lando.

La areo de agroj kun irigaciaj faciligoj en la tuta Ĉinio plimultiĝis de 230 milionoj da muoj\*\*\* en 1949 al ĉirkaŭ 1,000 milionoj da muoj en 1959, t.e. en la daŭro de 10 jaroj, salte pliiĝis je 800 milionoj da muoj. La irigaciata areo, kiu okupis antaŭe nur 16.3% de la tuta kulturata agraro, nun atingis pli ol 60%.

Tiuj ĉi atingoj multe plialtigis agrikulturan produkton, ŝanĝis la naturan kaj ekonomian fizionomion de la kamparo kaj akcelis la efektivigon de agrikultura kolektiviĝo.

La baseno de Haj-rivero en Hebej-provinco,

la baseno de Huaj-rivero fluanta tra Henan-, Anhuĵ- kaj Giangsu-provincoj kaj la regionoj apud Jangzi-rivero kaj multaj ĉirkaŭlagaj regionoj en centrosuda Ĉinio ofte suferis inundon aŭ tromalsekecon en la pasinteco. La damaĝata areo meznombro alproksimiĝis 400 milionojn da muoj. En kombino kun riverbridado, oni efektivigis en la pasintaj 10 jaroj grandskalan reformadon de la malaltejoj kaj multajn drenajn laborojn, kiuj nun jam multe helpas la batalon kontraŭ inundo aŭ tromalsekeco en tiuj regionoj.

La gravaj atingoj en la laboro de agra akvo-utiligo en Ĉinio rezultis ne el pasivaj rimedoj

**Kampoj formiĝis sur montoj en la aŭtonoma gubernio Longŝeng, en Guanghi.**

*Foto de Hiang Guo-ĝeng*






kontraŭ inundo, sed el sinteza mastrumado laŭ tuteca plano, kiu ŝanĝas akvo-katastrofojn en akvo-utiligon kaj aktive konservas akvon. Sekve dum la pasintaj 10 jaroj la akvomastrumado kaj la restigo de akvo kaj tero kontraŭ erozio en montregionoj fariĝis grava ĉenero de la agra akvo-utiliga laboro. De montsuproj ĝis montpiedoj, de ebenejoj ĝis malaltaj regionoj, ĉie laŭ lokaj kondiĉoj, oni fosis lagojn, konstruis digojn kaj la inundo estas antaŭevitata aŭ sur la monto aŭ en la ebenejo. Tio ne nur helpas kaj akvokonservejojn, alkondukis akvon sur montojn k.t.p., tiamaniere ke la grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj akvomastrumaj konstruoj interkompletigas unu la alian, kaj en ĉiu paŝo akvo estas retenata kaj barata, tiel ke la rekta forfluo estas disigite sorbata kaj disigite utiligata,

**Kampanoj en Boaj-gubernio, Henan-provinco elfosas fontojn por irigiacio.**

*Foto de Tang Maŭ-lin*



kaj la inundo estas antaŭevitata aŭ sur la monto aŭ en la ebenejo. Tio ne nur helpas en la batalo kontraŭ inundo en malaltaj regionoj, sed ankaŭ ŝanĝis la fizionomion de multaj montregionoj, kiujn karakterizas sekeco kaj malalta produkto. Laŭ nekompleta statistiko, la areo, kie erozio estas jam unuapaŝe regata, nun ampleksas pli ol 500,000 kvadratajn km. en la tuta lando.

La administrado de agra irigacio ankaŭ disvolviĝis rapide. La metodo kaj tekniko de irigacio pli kaj pli boniĝis. Rompitaj estas la limoj starigitaj en la pasinteco inter regionoj aŭ basenoj, kaj venkita la kontraŭdiro de akvokvantoj inter pluva kaj seka sezonoj. Krome, ambaŭ surtera kaj subtera akvoj estas plene utiligataj. Laŭ takso, en la kuranta jaro, la areo, kie laŭplana akvokonsumado estas efektivigita, ampleksas 680 milionojn da muoj kaj la areo, kie ĝardenigita irigacio estas efektivigita, atingas 390 milionojn da muoj tra la tuta lando. La novaj irigaciaj metodoj, kiel kondukado de akvo per subtera tubaro, disŝpruciga akvumado k.a. estas ankaŭ enkondukitaj en kelkaj progresintaj regionoj.

Alia nova entrepreno, kiu disvolviĝis kune kun la disvolviĝado de la agra akvo-utiligo, estas vilaĝaj hidroelektrejoj, kies elektroprodukta kapacito atingis 400,000 kv. ĉijare. Samtempe stariĝis pli multe da malgrandaj hidraŭlikaj

---

Feng mu:

**60 JAROJ**

*Strata Parko*

En Pekino estas strato nomata Donggiaŭminhiang kie troviĝis la malbonfame konata "Legacia Kvartalo", supera regno super la malnova duonkolonia Ĉinio. Nun ĉe la orienta enirejo ekestis Dongdan-parko, kiu fariĝas ĉiam pli bela de post ĝia konstruado antaŭ kelkaj jaroj. La alplantitaj miloj da altaj arboj kaj diverskoloraj floroj, la serpentumantaj aleoj kaj la "monteto" arteformita el belaj ŝtonoj faris la lokon des pli plaĉa. La belaj florbedoj sternaĝas tie kvazaŭ pecoj da plej delikata brodaĵo, kiam oni rigardas la parkon de sur iu veturilo en printempo. Eĉ en vintro, la parko ankaŭ allogas vizitantojn. Ĉiumatene venas ĉi tien gimnastikemuloj, kiuj

prilaborstacioj. Dum la lastaj 10 jaroj la irigaciaj kaj drenaj maŝinoj por agroj atingis sume pli ol 3,000,000 ĉf., t.e. pli ol tridekoble pli multe ol en 1949.

Tiuj ĉi atingoj estas plejparte akiritaj dank' al grandskalaj popolamasaj movadoj de akvo-utiligo, kiuj edukis milionojn da teknikistoj kaj administrantoj de akvo-utiligado, kreis kaj amasigis riĉajn spertojn kaj multe akcelis la disvolviĝon de koncernaj scienco kaj tekniko. Tial, kvankam proksimume triono de la agroj de nia lando restas nun ankoraŭ sen irigaciaj faciligoj kaj la efikeco de multaj akvo-utiligaj konstruaĵoj estas ankoraŭ ne sufiĉe alta por kontraŭstari inundon aŭ sekecon, tamen ni kredas, ke la diligenta kaj brava ĉina popolo, en ne tre longa tempo, plene ekspluatos la hidraŭlikajn eblecojn de la lando kaj realigos la grandiozan



**Lignan akvokondukan tubon oni konstruis en Giangkoŭ-gubernio de Gujĝoŭ-provinco por irigaciado.**

*Foto de Ma Gi-juan*

celon de irigaciigo de ĉiuj agroj kaj elektrigo de ĉiuj vilaĝoj.

\* *Reganto, super ĉiuj dioj laŭ ĉina mitologio.*

\*\* *Dio reganta super akvoj kaj akvaj bestoj.*

\*\*\* *15 muoj = 1 hektaro.*

## de unu strato en Pekino

faras tiun aŭ alian liberan nacistilan korpekzercon. Kelkaj maljunuloj emas sidadi en la pavilono aŭ sur la benkoj en belaj tagoj por babiladi sub la suno kaj ilia parolo nature emas tuŝi la pasintecon. Jen du blankharaj grandaĝuloj interbabilas antaŭ la razena zono:

“Kia granda ŝanĝo! Antaŭ kelkaj jaroj, sin trovis ĉi tie nur rubejo. Sed nun troviĝas anstataŭe pura tero kaj la loko fariĝis parko. Tion mi ja neniam antaŭsupozis!”

“Antaŭ dekkelkaj jaroj ĉi tie estis la soldat-ekzercejo de la fremdlandaj trupoj!”

“Ho, ne menciu la fremdajn soldatojn! Kiom da ĉinoj estis mortigitaj ĉi tie, kiam la aliancaj

armeoj de ok potencoj eniris Pekinon en 1900! Ekde tiu jaro Donggiaŭminhiang fariĝis ‘koncesio’. Cu vi ankoraŭ memoras, ke la embrazuroj sur la ĉirkaŭmuroj de tiu ĉi strato estis forigitaj nur post la liberiĝo?”

En la bela Dongdan-parko oni povas ofte aŭdi tiajn parolojn de maljunuloj. Sepdekkelkjarulo estas ja ankoraŭ la okulatestantoj de la grandaj ŝanĝoj de la strato, kiu iam antaŭe eĉ ligiĝis kun la sorto de Ĉinio.

### *Antaŭ 60 jaroj*

Ĉiuj scias, ke Donggiaŭminhiang estis antaŭe konata kiel “Legacia Kvartalo”. Ĉe la fino de la 19-a jarcento, ĝi estis ordinara strato nomata “Giangmi-strato”. Sed ĉar ĉi tie troviĝas princaj palacoj kaj multaj registaraj oficejoj de Kingdinastio, ekzemple la Ministerio de Armeoj, la Ministerio de Konstruaj Laboroj, la Imperia Hospitalo k.a. ĝi do montriĝis pli grava ol aliaj lokoj. En 1793, iu loko proksima al Ponto de Imperia Rivero estis asignita kiel “Gastigejo” por




eksterlandaj diplomatoj. Tiam la kortego de la King-dinastio ne permesis, ke la diplomaciaj senditoj longe restadu en la ĉefurbo. Ĝenerale la templimo estis 40 tagoj kaj en la limigitaj tagoj ili estis akceptataj en la "Gastigejo". Tamen en la dua duono de la 19-a jarcento ektroviĝis konstante restantaj senditoj kaj instaligis en Giangmi-strato kaj proksime de la Ponto de Imperia Rivero legacioj de Britio, Rusio, Germanio, Francio k.a. Pro la loĝado de fremdlandaj diplomatoj kaj enmigrintoj, tiu ĉi parto estis alinomita "Donggiaŭminhiang".

La starigo de legacioj en Donggiaŭminhiang sendube estis rezultato de minaca altrudo. Tiamaniere la imperialistoj ne nur sukcesis rompi la firme ŝlositan pordegon de King-dinastio, sed ankaŭ starigis bastionon en la koro de Ĉinio. Kontraŭ tio la feŭdaj regantoj Manĉuriaj estis senhelpaj.

Ekde tiam, la invada centro de imperialistoj translokiĝis de Kantono al tiu ĉi strato en Pekino. Ilia prirabado al Ĉinio vekis ekstreman indignon en la koro de la ĉina popolo kaj finfine eksplodis en la komenco de la kuranta jarcento la fame konata Jihetuan-okazintaĵo (Boksista Movado).

En somero de 1900, sennombraj subpremataj kampanoj el gubernioj ĉirkaŭ Pekino, kune kun laboristoj en la urbo, svarmis al Donggiaŭminhiang kaj ĝin sieĝis. Sekvis furioza batalo. Timigite la anoj de la imperialistaj legacioj haste konstruis fortikaĵojn kaj fosis tunelojn por interkomunikado unu kun alia. Samtempe ili sendis telegramojn al siaj registaroj por senprokrasta helpo. Ok imperialistaj landoj ekspedis trupojn, kaj okupis Pekinon. La urbo estis dividita en kelkajn "okupatajn distriktojn", kiujn la invadintoj plene prirabis, kaj devigis la Pekinajn loĝantojn per pafiloj kaj bajonetoj porti sakojn post sakoj kaj kestojn post kestoj plenaj de oro, arĝento, juveloj kaj aliaj valoraĵoj en la diversajn legaciojn en la strato. La antikvaj palacoj, la palacoj de nobeloj, la ordinara vendetoj kaj la hejmoj de civitanoj, ĉiuj estis senescepte prirabitaj. Eĉ la raraj instrumentoj en antikva observatorio estis ankaŭ forportitaj en la francan kaj germanan legaciojn. Dum la imperialistaj soldatoj prirabis ĉiujn kaj perfortis virinojn, ili ankaŭ freneze masakris senkulpaĵajn loĝantojn de Pekino.



**Domegoj konstruiĝas unu post la alia.**

*Lignogravuraĵo de Li Hua*

Preskaŭ ĉe ĉiu vojkrucio, precipe en la Dongdan-placo ĉe la orienta enirejo de Donggiaŭminhiang, plene kuŝis kadavroj de senkulpaĵaj ĉinoj. Tion propraokule atestis ĉiuj "maljunaj pekinanoj" pli ol sesdekjaraj. Hodiaŭ, en la arkivo de la Pekina Historia Muzeo estas ankoraŭ bone konservataj la tiamaj fotografajoj de ĉinaj popolanoj masakritaj de la imperialistoj.

Post tiu ĉi tumulto la kadukiĝinta senpova registaro de King-dinastio subskribis la humiligan "traktaton de 1901". Kaptinte multajn privilegiojn en Ĉinio, la imperiistoj kiel etendita araneajo ekkaptis firme riĉfontojn de Ĉinio kaj superregis la feŭdajn burokratojn kaj militaristojn. Ĉinio ekdronis en interbatalado inter militaristoj subtenataj de imperialismaj landoj kaj la imperialistoj daŭre kaj senfine suĉis la sangon de la ĉina popolo. La centro de tiu araneajo estis Donggiaŭminhiang, kiu fariĝis la komandejo de imperialismo en Ĉinio.



La ok imperialistaj landoj ekde tiam faris tiun ĉi straton "koncesio", kie ĉiuj ĉinaj registaraj oficejoj estis aŭ forbruligitaj aŭ malkonstruitaj. Konstruiĝis novaj oficejoj de legacioj de la ok landoj, kiuj unuiĝis en "Legacian Korpuson" kaj starigis la unuiĝintan administran organizon "Unuiĝinta Policejo" kaj kompletan sistemon de milita, justica, ekonomia kaj kultura administrado. Ĉe ambaŭ finoj oriente kaj okcidente de la strato estis starigitaj dikaj feraj pordegoj, kiujn gardis tage kaj nokte policianoj de la "Unuiĝinta Policejo" kaj kiujn ĉinaj popolanoj ne estis permesitaj libere trapasi, nek la ĉinaj soldatoj kaj policianoj.

En tiu ĉi strato, proksime al la legacioj de la diversaj landoj, estis konstruitaj iliaj respektivaj kazernoj kaj Dongdan-placon la imperialistoj faris sia soldat-ekzercejo, sur kiu la fremdaj soldatoj ĉiutage paradis pri sia milita forto. La strato estis forte fortikigita per ĉirkaŭmuroj ĉe orienta, okcidenta kaj norda flankoj kun sennombraj embrazuroj. En la Itala Legacio, la plej proksima al la Imperiestra Palaco, estis muntitaj du kanonoj direktataj rekte al la Palaco. Ilin gardis tage kaj nokte kanonistoj, kvazaŭ milito estus eksplodonta en iu ajn momento. Nur en 1924 tiuj du kanonoj estis forigitaj, kiam d-ro Sun Jat-sen tion protestis post lia alveno al Pekino.

En tiu ĉi strato sin trovis ankaŭ fremdaj bankoj de Usono, Francio, Britio, Japanio kaj Cara Rusio. Kunlaborante kun Nordĉiniaj militaristoj, tiuj bankoj elsuĉadis la sangŝviton de la ĉina popolo. Krome, la bankoj faris investon en Ĉinio per la sangodora mono deponita de la ĉinaj militaristoj kune kun ilia propra eksportita kapitalo, kaj per tio ili senfine elpremadis pli grandan profiton. Ili estis unu el la ĉefaj sangsuĉaj tuboj de la fabrikoj kaj aliaj entreprenoj fonditaj de fremduloj en Ĉinio.

Per tiu ĉi supera regno en Donggiaŭminhiang, la imperialistoj rekte intervenis en la internaj aferoj de Ĉinio, superregis siajn lakeojn de ili apogatajn por fari ĉiuspecajn prirabadojn kaj protektis politikajn rubaĵojn ĉinajn. Maljunuloj ankoraŭ memoras, ke kiam Puĵi, la eksimperiestro de la King-dinastio estis forpelita el la palaco, la Japana Legacio tuj invitis tiun "Henriko Puĵi"-n por rifuĝi sub ĝia protekto.

Multaj militaristoj ankaŭ rifuĝis ofte al siaj subtenantoj—la imperialistaj legacioj, kiam ili perdis sian potencon.

## La nova aspekto

Ekde la komenco de la kuranta jarcento, Donggiaŭminhiang fariĝis jam simbolo de malhonoro por la ĉina popolo. Ĉiuj sentis senkomparan indignon kaj malamon kontraŭ la okupantoj de tiu ĉi loko. Tiun ĉi malhonoron oni forlavis fine kiam antaŭ dek jaroj la armeo de la ĉina popolo majeste marŝis en la straton.

Estis liberigita Pekino. La Popola Liberiga Armeo de Ĉinio okazigis triumfan eniron en la urbon kaj imponaj kolonoj da armeanoj venis tra la strato. La Usona kaj Britia Ambasadorejoj, kiuj superregis Ĉinion dum la pasintaj jardekoj, fermis siajn pordegojn. Nuntempe, ĉi tiu loko fariĝas la centro de interamikiĝo de Ĉinio kun ĉiuj frataj nacioj kaj kun ĉiuj pacamantaj amikoj eksterlandaj. Ĉe strato Tajgicang en la sidejo de la antaŭa Itala Legacio nun troviĝas la Pacdefenda Komitato de la Ĉina Popolo. La luksa Internacia Klubo kaj la nove plivastigita Internacia Hotelo, nomata nun Pekina Hotelo, apud la Ponto de Imperia Rivero estas la renkontejo kaj loĝejo de la eksterlandaj amikoj. Multaj el ili, kiuj estis en Pekino antaŭe kaj nun venas denove al tiu ĉi strato, ne povas reteni sian profundan kortuŝiĝon. Iu japana vizitanto diris, ke antaŭ dekelkaj jaroj, tiu ĉi loko estis alia mondo, sed nun, ĝi estas bela strato de la ĉina popolo kaj loko de paca interamikiĝo.

Dek jarojn antaŭe, sur la strato ĉi tie staris aŭ patrolis fremdaj soldatoj kaj policianoj kaj ĉinaj popolanoj ne estis permesataj libere pasi. Sed nun tie ĉi kuras ĉinaj elektraĵoj omnibusoj kaj aŭtobusoj. Konstruiĝis ankaŭ pompa sep-etaĝa "Hinkiaŭ-hotelo" ĉe la orienta fino de la strato por akcepti pli kaj pli multiĝantajn eksterlandajn vizitantojn.

La lastaj 60 jaroj estis tempo, dum kiu la ĉina popolo klopodis kaj sukcesis sin liberigi de la imperialisma sklavigo per siaj heroaj luktadoj. La 60-jara historio de Donggiaŭminhiang estis konkreta atesto de tiu ĉi historia disvolviĝo. La epoko, en kiu imperialismo povis superregi Ĉinion laŭplaĉe, estas forpasinta por ĉiam.

*Liang Čeng-ŝi:*

# Junularo kuraĝa por fari ĉion

**“La mondo estas kaj via kaj nia, sed finfine ĝi estos via. Vi junuloj, plenaj je energio kaj vivferto, estas en la floranta aĝo de via vivo, kiel suno je la oka aŭ naŭa en la mateno. Ni metas niajn esperojn sur vin.”**

— *El la parolado de Prezidanto Maŭ Ze-dong al ĉinaj studentoj en Moskvo, nov., 1957.*

Unu el ĉiu kvino, aŭ 130 milionoj da ĉinoj, estas inter la aĝoj de 15 kaj 25. Gejunuloj okupas preskaŭ duonon de la tuta nombro de la industriaj laboristoj kaj 100 milionojn da kamparanoj. Sin trovas pli ol 10 milionoj da studentoj en mezlernejoj, mezgradaj teknikaj lernejoj, kolegioj kaj universitatoj. Iliaj nombro, revolucia vervo, firma subteno al la Popola Registaro kaj la Ĉina Komunista Partio kaj preteco iri ĉien ajn kaj elteni ĉiun ajn malfacilecon igas la ĉinan junularon agi kiel “sturma forto” en la plejfronto de la lando por la batalo por pli bona vivo.

## Multaj bonoj

La granda entuziasmo manifestata de la ĉina junularo ne estas senkaŭza. Antaŭ ĝi kuŝas nun tia promeso, kia neniam ekzistis en la pasinteco. Gejunuloj ne nur kunguas la bonojn, kiujn ĉiuj laboristoj nun ĝuas, sed ili ankaŭ havas aliajn specialajn avantaĝojn. Efektive troviĝas senlima ŝanco por iu ajn junulo ricevi trejnadon kaj trovi laboron en la profesio elektita de li aŭ ŝi. Lastan jaron sole en fabrikoj kaj minejoj estis proponataj 13 milionoj da novaj oficoj, la plejparto de kiuj estis plenigita de gejunuloj. En 1958 estis 660,000 studentoj en universitatoj kaj kolegioj, 50% pli multaj ol en 1957; la 12 milionoj da studentoj en mezlernejoj estis 70% pli multaj ol en la pasinta jaro. Al la studentoj de altgradaj lernejoj, la registaro donas senpagan instruadon kaj loĝadon, kaj en okazo de bezono subvenciojn por manĝado kaj aliaj elspezoj.

Junaj laboristoj kaj kamparanoj havas bonajn ŝancojn por lernado dank’ al en-ofica trejnado kaj postlaboraj mezlernejoj. Multaj junaj plenaĝuloj ankaŭ vizitas kursojn por klerigado kaj baza edukado. En malnova Ĉinio 80% de la junularo estis analfabetoj. Lastjare pli ol 36 milionoj da junaj laboristoj kaj kamparanoj lernis legi kaj skribi, pliiĝante la nombron de leg-skribpovuloj ĝis du trionoj de ĉiuj personoj inter la aĝoj de 15 kaj 25. Planoj alvokas, ke analfabeteco estu tute likvidita por tiu ĉi aĝ-grupo en la daŭro de du ĝis tri jaroj.

Politike la junaj civitanoj de Ĉinio ĝuas elekto-raĵton ekde la aĝo de 18. Multaj gejunuloj, kiuj faris rimarkindajn kontribuojn ĉu al siaj laboroj aŭ en siaj lokoj; estas elektitaj kiel lokaj, delegitoj aŭ kiel reprezentantoj en la Nacia Popola Kongreso.

En agrikulturo, la natura kontraŭstaremo de la junularo kontraŭ malnovaj kutimoj estas grava faktoro por akiri rekordorompajn rikoltojn. Lastan jaron, kiam la plano akiri altajn produktokvantojn estis unue popularigita per malgrandaj eksperimentaj parceloj, pli ol 30 milionoj da gejunuloj tra la tuta lando kulturis ĉirkaŭ 31 milionojn da muoj de eksperimentaj kampoj. En Henan-provinco, 13 el la 17 terpecoj, kiuj donis la plej altajn kvantojn da rikolto de tritiko, estis kulturitaj de gejunuloj. En interprovincaj konferencoj lastan februaron, junaj kamparanoj de

Henan, Ŝanhi, kaj aliaj tritikproduktantaj provincoj promesis, ke ili tutforte klopodos por garantiĝi altajn rikoltokvantojn en la vastaj areoj kiujn ili kulturas en junulaj sturmbrigadoj aŭ en teamoj kun pliaĝaj kamparanoj.

### Lertaj knabinoj, multpovaj personoj

La junularo estas ankaŭ ĉe la plejfronto de la tutlanda kampanjo por plibonigi efikecon kaj teknikon, enkondukante multajn el la 10,000 agrikulturaj instrumentoj reformitaj dum la lasta jaro. La junularo penas plene koni kelkajn laborspecojn por fariĝi "multpovaj personoj". Pli ol 500,000 en Hubej-provinco jam fariĝis tiaj "universalaj personoj" aŭ "indiĝenaj specialistoj", kiuj atingis bonajn rezultatojn sen ia ajn regula trejnado. Ŝanhi-provinco alvokas junulinojn, ke ili plene konu sciojn de produktado kaj en terkulturado kaj en kampara industrio por akiri al si la titolon de "lerta knabino".

Nau junaj kamparanoj, kiuj faris elstarajn plibonigojn je instrumentoj de terkulturado kaj akvo-utiligo, lastjare fariĝis membroj de la Ĉina Agrikultur-maŝina Asocio, organizo dediĉita al esplorado pri la mekanikigo de agrikulturo. Kvin el ili estis ankaŭ invitataj por esti specialaj esplorantoj de la Agrikultur-maŝina Esplora Instituto. Inter ili troviĝis 23-jara Peng Ĉong-ŝun el Siĉuan-provinco, kiu elpensis 17 plibonigitajn instrumentojn, inter kiuj estis semilo dekoble pli efika ol mansemado.

La kredo, ke la hibridigo de malproksimaj specoj ne povas reteni la bonajn kvalitojn de iu

ajn el la du, estas frakasita de la eksperimentoj fare de du junuloj dudekelkjaraj, Giang Ŝaŭfang el Guanghi-a Aŭtonoma Regiono de Ĝuangnacio kaj Ĝoŭ Han-hua el Guangdong-provinco. Dum la pasintaj tri jaroj, Ĝoŭ sukcesis kulturi kvin novajn alt-produktajn specojn de rizo per ĝia hibridigo kun sorgo. Giang hibridigis rizon kun maizo, el kio fariĝis forta rizo sekec-resistanta.

### Studo kaj laboro

Studentoj de universitatoj ankaŭ kontribuis sian parton al la teknika revolucio en la kamparo, kie multaj nun pasigas semajnojn aŭ eĉ unu jaron. Rilativante sian scion lernolibran kun realaj problemoj, la junaj sciencistoj helpis prepari novajn sterkojn kaj plirapidigi la modernigon de vilaĝa vivo. Samtempe, spertante kamparajn kondiĉojn, ili sin preparas por pli valoraj kontribuoj estontaj.

En la pasinta jaro, ne nur teknikaj lernejoj, sed kolegioj kaj mezlernejoj ankaŭ starigis fabrikojn, laborejojn kaj kulturejojn por kunigi teorion kun praktiko. Universitataj studentoj jam faris centojn da produktaĵoj de tre alta teknika nivelo kaj pluraj universitatoj jam konstruis pli ol dek ciklotronojn. La ŝtala industrio multe plaĉas al la junuloj kaj altiras ilin al si kiel magneto. Du trionoj de l' ŝtal-laboristoj en Anŝan-a Fer-ŝtala Unuiĝinta Uzino estas junuloj. Multaj laborejoj havas specialajn junulajn teamojn. La junaj laboristoj plibonigas sian teknikon per konkursoj inter laborejoj aŭ laborteamoj, kiuj elektas unu aŭ plurajn "Ruĝflagajn kapablulojn" pro ilia bonegeco en la laboro, kunlaboro kaj aliaj flankoj. Plialtigo de produktado per konkursoj nun okazas inter laborejoj, laborvicoj, fornejoj kaj aliaj laborteamoj.

Kiel oni vidas, la junularo en Ĉinio nun viglas en ĉiuj frontoj de socialisma konstruado. Ja malfermiĝas antaŭ ili senlima kampo por tia energio, agemo kaj iniciatemo. Kaj plie, ili jam havas nenian zorgon pri senlaboreco, subpremado kaj persekutado, kiujn la junularo suferis antaŭ la Liberiĝo. "Por pli bela estonteco" — jen ilia sola sopiro.

### Junaj sciencaj laborantoj klopodas bone koni kaj konkeri dezertojn en la Nordokcidento

Foto de Haŭ Ĉang-geng





# Nova etapo de virina movado en Ĉinio

La liberiga movado de ĉinaj virinoj estas konsistiga parto de la popola revolucio kaj socialisma konstruado en Ĉinio. Vastaj amasoj de ĉinaj virinoj aktive partoprenis kaj partoprenas sinsekvajn revoluciajn movadojn kaj konstruadon de socialismo. Tio pligrandigas la forton de revolucio kaj konstruado; kaj samtempe, ĉiu venko de la revolucio kaj ĉiu sukceso de la konstruado antaŭenpuŝas la liberigan movadon de virinoj.

## Revuo de la pasintaj dek jaroj

Tuj post la starigo de la Popola Respubliko de Ĉinio ĉiuj malnovaj leĝoj kun malegaleco malfavore al virinoj estis komplete abolitaj. En multaj leĝoj kaj dekretoj, proklamitaj de la Centra Popola Registaro, Komenciĝante per la Komuna Programo de la Popola Politika Konsiliĝa Konferenco, akceptita en la jaro 1949, manifestiĝas ĉie la egalrajteco de virinoj kun viroj en ĉiuj kampoj: politiko, ekonomio, kulturo-eduko kaj socia vivo. Ĉu per apartaj leĝoj, ĉu per

**Kampaninoj apud Ĉengdu, Siĉuan-provinco selektas rizospikojn por riĉa rikolto venontjara.**

*Foto de Sun Ĝong-ĝing*



precizaj klaŭzoj en koncernaj leĝoj, estas garantiataj libero de geedziĝo, protekto al sano de laborantinoj kun aparta traktado dum akuŝado, malpermeso de malegala traktado kontraŭ laborantinoj kaj lernantinoj en koncernaj sferoj, egala rajto por virinoj en balotado, plibonigo de protekto al virinoj kaj infanoj, kaj tiel plu. La ĉenoj katenintaj la virinojn en la malnova socio estas disrompitaj unu post la alia tiel en formo kiel en spirito.

Dum la unuaj jaroj post la liberiĝo, la ĉinaj virinoj jam komencis partopreni diversajn produktajn laborojn en industrio kaj agrikulturo. Aperis amase eminentaj laborantinoj kaj la unuaj traktoristinoj, masonistinoj, termezuristinoj, geologiaj boristinoj, aviadistinoj, ktp. La Agrareforma movado donis al virinoj unuafaje en ĉina historio la rajton posedi teron. Samkiel la viroj, ĉinaj virinoj povis havi siajn nomojn sur la teratestiloj. Kune kun la renverso de feŭdismo, ankaŭ plene frakasiĝis la feŭdaj moraloj, kiuj por miloj da jaroj viktimitis la virinojn. La liberigo de virinoj restas jam ne plu slogano, nek frazo sur papero, sed realaĵo iom post iom enradikiĝinta en la vivon.

Dum la jaroj 1953—1957, la periodo de la Unua Kvinjara Plano, en Ĉinio komenciĝis grandskala konstruado de socialismo kaj ĉinaj virinoj de diversaj nacioj ankaŭ klopodis entuziasmege en la konstruado. En 1957, la nombro de laborantinoj jam duobligis kompare kun tiu en 1952-a kaj pli ol sesobligis kompare kun tiu en 1949. La nombro de novaj laborantinoj en 1958 sola jam superis dekoblon de la tuta laborantinaro antaŭ la liberiĝo. La kampaninoj, kiuj zorgis nur pri dommastrumaj aferoj aŭ helpis en agrikulturaj laboroj antaŭ la liberiĝo, nun jam same

fariĝas ĉefa forto en agrikultura produktado. En 1958, la jaro de la granda antaŭensalto en industrio kaj agrikulturo, ĉinaj virinoj, same kiel la viroj, kreis miraklojn en produktado per vulkana energio en laboro. La starigo de popolkomunumoj estas granda reformo kun historia signifo en la socia vivo de la ĉina kamparo kaj tio ankaŭ fortigas la materialan fundamenton por la plena liberigo de virinoj. En la periodo de nia granda socialisma konstruado, ankaŭ la virina movado enmarŝis novan etapon.

### Ĉefaj karakterizaĵoj de la nova etapo

Kio estas la ĉefaj ŝanĝoj karakterizaĵoj de la virina movado en Ĉinio en tiu ĉi nove historia etapo?

La unua plej fundamenta karakterizaĵo estas tio, ke en la tuta lando la multnombraj virinoj plej vaste kaj en plej diversaj sferoj partoprenas produktadon en industrio kaj agrikulturo kaj aliaj konstruaj laboroj. Kaj plejparto de la virinoj fariĝis socilaborantoj.

La granda impeto en industrio kaj agrikulturo en 1958, la disvolviĝo de diversaj entreprenoj en la popolkomunumoj, ĉio ĉi malfermis la plej vastan kampon de socio-laboroj por virinoj. En la kamparo preskaŭ ĉiuj laborpovulinoj partoprenas laborojn en ĉiuspecaj entreprenoj de la popolkomunumoj. Laŭ statistiko de 23 urboj, 40-60% de la dommastrinoj jam partoprenas soci-laborojn. Ili vere ludas senprecedence gravan rolon en la produktado, tiel ke ankaŭ tiuj, kiuj antaŭe malestimis aŭ malpli estimis virinojn, vole-ne-vole devas konfesi, ke la virinoj povas multon kontribui en la konstruado de socialismo.

Ĝuste pro tio, ke la virinoj vaste partoprenas soci-laborojn kaj ludas gravan rolon en la konstruado de socialismo, ili akiras veran estimon en la socio kaj gajnas la respekton de siaj bogepatroj kaj edzoj. Ilia nuna socia pozicio estas tute ne komparebla kun tiu antaŭ la liberiĝo kiam la virinoj estis "ornamajoj" en la socio kaj sklavinioj en la hejmo.

La dua karakterizaĵo de la virina movado en la nova etapo estas tio, ke sekve de la ĉiuflanka impetado en produktado, kaj precipe sekve de la fondiĝo de la popolkomunumoj, ĝenerale kaj rapide disvolviĝis la bonstatigaj aferoj kolektivaj



**Brodistinoj en la Brodaj-farejo de Suĝou-gubernio kreas novajn verkojn.**

Foto de Ding Gjun

en tutlanda skalo, kio liberigis virinojn de multaj dommastrumaj laboroj kaj ebligis al la urbaninoj kaj kamparaninoj al partopreno de produktado.

Post la starigo de popolkomunumoj en 1958, plejparto de kamparanaj familioj tra la tuta lando havas siajn manĝojn ĉe komunaj manĝejoj. La infanoj en la vartejoj tra la lando en 1958 plimultiĝis sepoble kompare kun 1957, kaj la pliaĝaj infanoj en la infanĝardenoj dudekses-obliĝis. Tio liberigis dekojn da milionoj da virinoj el peza dommastrumado kaj ebligas ilin partopreni socian laboron kaj socian vivon sur egala bazo kun la viro. Estas nun ebleco por edzino kaj edzo kune labori, studi kaj partopreni socian aktivadon en paro. Ili ĝuas ambaŭ amplenan familian vivon kaj riĉan ĝojplenan kolektivan vivon. La virinoj gaje kantas pri tiu ĉi nova vivo:

*"Antaŭe ni proprajn dometojn mastrumis,  
La sep necesajoj\* en-kape zumzumis,  
Per muelŝtono turnire ni sportis,  
Nian infanon surdorse ni portis.  
Labori surkampe, ja nia kor-volo,  
Sed hejme kroĉiĝis domaĝe la koro.  
Nun dommastrumado socialigita,  
En miloj da hejmoj sonore ni ridas.  
La manĝojn ni havas ĉe komun-manĝejoj,  
Infanojn ni sendas al infanvartejoj,*

\* Estas ĉina proverbo, kiu diras: "En la hejmo estas sep necesajoj: hejtajo, rizo, oleo, salo, saŭco, vinagro kaj teo."



*Tutkore laboras ni tute senĝene,  
Ne plu sunsubiron ekvidas ĉagrene.  
Post taga labor' familio la tuta,  
Sidiĝas kun ĝojo por horo la studa."*

Kompreneble, la virinoj ne formetis ĉian dommastruman laboron. Dommastruman laboron ili havis, havas kaj ankaŭ havos. Sed ĝi ne plu estas laboro katenanta la virinojn de kleriĝo, nek elĉerpanta la tutan energion de la virinoj, sed laboro ĝojiga, beliganta la vivon, plenumata de virinoj post socia laboro, kiel necesa parto de la vivo.

La tria karakterizado de la nova etapo de la virina movado estas tio, ke profunda ŝanĝiĝo okazis en la spirita mondo de la virinoj.

En konsekvenco de ŝanĝiĝo de la vivo de ĉinaj virinoj, ankaŭ iuj ideoj formiĝintaj antaŭe el ilia limigita vivo en malgranda sfero, estas forlasitaj.

Ne nur la junaj virinoj kulturis al si aktivecon por la socialisma konstruado kaj socialisman konscion en laboro, sed ankaŭ al maljunulinoj, kiuj antaŭe estis konservativaj, fariĝas viglaj kaj progresemaj. Antaŭe kiam virinoj sidiĝis kune, ilia babilado ne iris ekster la limojn de kritikado pri la okcidenta aŭ orienta najbaro; sed nun

**Multaj knabinoj laboras en la Pekina Valvo-fabrika. Jen sceno en unu laborejo.**

*Foto de Ju Hui-ju*



interparolante, ili ĉiam diskutas pri rimedoj por pli bone plenumi la produktan taskon aŭ la planon de antaŭensalto. La dependemo, konservativismo, humuliĝemo ktp., kiuj antaŭe estis ĝeneralaj karakterizoj de virinoj, nun estas

anstataŭigitaj per sendependa pensado, memfido, kaj kuraĝo en pensado kaj agado, kiuj formiĝas iom post iom dum la granda impeto. Sur ĉiuj produktaj frontoj aperis elstarantaj virinoj, kiuj montris la forton kaj klerecon de la virinoj.

En la hejmo ne plu aŭdiĝas tia insulto kia "Estas mi, kiu vin vivtenas!"; la edzino ne plu kverelas kun siaj bogepatroj aŭ sia edzo pro bagatelajoj kiel unu kudrilo aŭ fadeno; la edzo ankaŭ ne plu koleras pro tio, ke la edzino ne pretigis manĝaĵon ĝustatempe. La hejmo pleniĝas je sincereco, amo kaj solidareco. Venas nova elemento en la vivon inter edzo kaj edzino, kaj la viro kaj virino fariĝas vere egalaj en personeco.

### **Ankoraŭ unu paŝo antaŭen**

Sed la plena liberiĝo de ĉinaj virinoj plenumiĝos nur post plua disvolviĝo. Nun, multaj pezaj laboroj ankoraŭ baras la vojon de virinoj al iuj produktaj branĉoj, tiel ke la ebleco fari pli grandan kontribuon por ili estas certgrade limigita. La teknika kaj kultura nivelo de la virinoj estas ankoraŭ iom malalta por renkonti la postulojn de la nacio kaj la bezonon de la disvolviĝo de produkto. La publikaj bonstatigaj servoj kolektivaj estante ankoraŭ en sia komenca etapo ne povas plene kontentigi la postulojn de la popolamasoj. En la socio ankoraŭ ekzistas restaĵo de la feŭda ideologio, la malegala traktado al la virinoj. La virinoj ankoraŭ ne tute liberiĝis de dependemo, konservativismo kaj humuliĝemo. Tamen, estas certe, ke kun la grandskala disvolviĝo de la konstruado de socialismo, efektiviĝos unu post la alia la mekanikigo kaj aŭtomatigo en industria kaj agrikultura produktadoj, efektiviĝos ankaŭ la altigo de nivelo en tekniko kaj kulturo de virinoj, kaj la vasta disvolviĝo de publikaj kolektiva servo. Kaj tiam ankaŭ la historia tasko de plena liberiĝo de la virinoj realiĝos. La virina movado en Ĉinio nun iras antaŭen al tiu ĉi grandioza celo.





# NEKONATA GASTO

**E**STIS tagmezo. Mi estis ripozanta. Venis la komunikisto malgranda Vu kaj diris al mi ke iu maljunulo volas min vidi. Mi tuj rapidis al la oficejo. La ĉambro estis ŝlosita. Ĉe la pordo troviĝis seĝo, kiu kredeble estis metita de malgranda Vu por la maljunulo. Sed la seĝo estis vakanta. Oni ne sciis kie estas la homo. Mi malŝlosis la pordon kaj iom atendis sidante en mia laborĉambro, sed alvenis neniu. Do mi eliris el mia ĉambro, kaj promenis laŭ la koridoro. Kiam mi proksimiĝis al iu klasĉambro, mi ekaŭdis de tie parolon: "Tenu firme! firme! Ne malstreĉu. . . ." Tuj poste, aŭdiĝis sono de frapado. Mi iris en la klasĉambro kaj trovis ke kelkaj lernantoj kuŝe kun iu laborist-aspekta viro riparas fenestron. Tiu homo, kun la dorso kontraŭ mi, portas sur si olemakulitan laborveston kun ŝraŭbilo en sia mano, estis alfiksanta feran ringon al la fenestroklapo por ĝin rekunigi kun la fenestrokadro. Nur kiam la lernantoj diris: "Alvenas s-ro lernejestro," eklevis li la kapon. Tiam mi rimarkis, ke li estas jam maljuna, kun hararo kaj barbo grizaj, sed la vizaĝo brilas ruĝe kun sufiĉe da vigleco. Li tuj diris: "Kamarado lernejestro, estas mi kiu petas vin vidi. Tamen bonvole iom atendu, tuj kiam tiu ĉi fera ringo estos en ordo, mi venos interparoli kun vi."

Kiam ni iris al mia laborĉambro, li diris al mi: "Interesaj estas tiuj ĉi etuloj. Vidante ke mi havas ŝraŭbilon en la mano kaj laboristan veston sur la korpo, ili tuj demandis, ĉu mi alvenas por ripari la fenestron. Estas interese. . . ." Atinginte la laborĉambro, li diris ke li havas iun aferon por preparoli kun mi, sed mankas alia konvena tempo, tial li utiligas la neokupatan tempon antaŭ la laborhoroj, por min viziti kaj iom babili.

La afero, kiun li preparolis, estis tue neatendita de mi. Jen, antaŭ tri tagoj, lia juna fileto

voĉlegis al li el tagjurnalo, ke iu lernanto de Hubin-a Elementa Lernejo, volas fariĝi ŝtallaboristo post elkresko, kaj pro tio ne bone lernas; ĉar li opinias ke por ŝtallaboristo gravas nur korpoŝorteco, kaj ne estas necesa klereco, tial li ofte ne vizitis la lernejon, kaj ĝenerale ricevas noton "2" en ekzamenoj. Tiam li pensis, ke la Hubin-a Elementa Lernejo estas tre proksima de lia fabriko, kaj li povas ĝin viziti kaj pridemandi pri tiu afero. Sed li ankaŭ pensis, kion li povas fari, se la instruistoj, kiuj speciale zorgas pri la infanoj, ne havas bonan rimedon. Tamen, li denove pensis, ke li estas laboristo, kaj la knabo ne bone lernas ĝuste pro tio, ke li volas fariĝi laboristo, do li havas devon zorgi pri tiu ĉi afero. Sekve li venis al ni—la Hubin-a Elementa

**Tiru Forte!**

*Lignogravuris Ĝe Fen*





Lernejo. Aŭdinte lian parolon mi ekrugiĝis. La dirita knabo estas Liu Ping de la kvina klaso. Longe influata de sia familio, tiu knabo erare opiniis ke nur bone labori jam sufiĉas, kaj ne tute gravas bone

lerni. Instruistoj kaj kunlernantoj mult-maniere lin helpis, sed sen bona efiko. Iu juna pioniro el lia klaso skribis al la tagjurnalo pri la afero, kaj la letero estis publikigita. Mi rakontis al li la tutan cirkonstancon, dankis lin pro lia afabla zorgemo, kaj petis lian helpon. Li diris ke li volas vidi tiun Liu Ping.

Liu Ping estis alvokita, kaj iom konfuzite sidiĝis kontraŭ mi. La maljuna laboristo iom lin pridemandis, kaj intime disvolvis kun li interparoladon. La maljunulo rakontis al Liu Ping: Kiam li estis okjara, mortis lia patro, kaj la patrino ne povis vivteni lin kaj sendis lin paŝti bovon por aliulo; bovknabo manĝis nur manĝorestaĵojn ne sufiĉajn por satiĝi; kaj kiel la vestaĵojn li havis nur ĉifonan pantalonon por somero kaj tavolon da fragmitfloroj kovritan per ĉifona tolo por vintro. Krom tio la mastro ofte lin vipis per la paŝta vipo, ke lia tuta korpo plene kovriĝis per sangaj postsignoj. Tiam por li eĉ ne estis certa la vivado, jam ne parolu plu pri vizitado al lernejo kiel por la nuntempaj geknaboj. Li parolis kaj parolis kaj larmoj ekplenigis liajn

okulojn. La infana koro estas facile tuŝebla. Aŭskultante ankaŭ Liu Ping ekploris. Kiam la maljuna laboristo finrakontis sian travivaĵon, li trinkis iom da teo, elprenis pecon da kreto el la poŝo, kaj desegnis sur tero tranĉilon de tornilo. Kaj li daŭrigis: "Ne pensu, infano, ke laboristo ne bazonas kulturon, fakte laboristoj ja bezonas kulturon. Tekniko estas afero malsimpla. Antaŭ tri jaroj, okazis en nia fabriko ruĝflaga konkurso, tiam mi estis tornisto, kaj mia konkuranto estis metilerninto ĵus fininta la lernadon ĉe mi. Ĝenerale la tekniko de metilerninto ne povas atingi la nivelon de tiu de la majstro, ĉu ne? Tamen tiu junulo estis gradiĝinto de malsupera mezlernejo, el teknika libro li legis progresintan sperton, kaj laŭ tio li frotĝustigis la klingrandon de torniltranĉilo. Rezulte, li tornis pli rapide kaj pli bone, kaj fine mi estis superita en la konkurso. Depost tio, mi decidis lerni legi kaj skribi kaj daŭre lernis tri jarojn. Nun mi jam povas legi ordinarnarajn librojn." Tion dirinte, li ekprenis de sur mia skribotablo la libron "Maljejev en lernejo kaj en hejmo", kaj ĝin laŭtleĝis. Li legis unu paragrafon, tre bone, senerare. Poste, li diris al mi: K-do lernejestro, jam estas ne frue, mi devas iri por labori. Dimanĉe mi sendos al vi mian filon, lasu Liu Ping kune kun li veni al mia hejmo, kaj mi pli detale interparolos kun li. . . ,"

La maljuna laboristo foriris. Mi malfermis fenestron kaj rigardis lin iom post iom malproksimiĝanta sub la printempa sunbrilo. Karasante la kapon de Liu Ping, mi ekhavis en mi profundajn pensaĵojn, sed en la momento mi vere ne sciis kion diri.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

### Novajoj koncerne al la Ĉina Simio-homo

De junio ĉijare komenciĝis la kvara fojo de esplorfosado en Ĝoukoŭdian, la hejmloko de ĉina simiohomo (*Sinanthropus Pekinensis*) depost la Liberiĝo. La aperturo, flankoj kaj fundo de la kaverno, en kiu oni siatempe trovis la faman fosilion, estas ne plene elfositaj en la tri unuaj esplorfosadoj. Laŭ la opinio de specialistoj, la apud-eco de la kavern-aperturo estis


ŝatata loĝejo de la simio-homoj kaj sekve, tie estas pli probable troveblaj fosilioj kaj restaĵoj de la simio-homo. En la nuna fojo oni intencas elfosi tiujn ĝis nun ankoraŭ ne tuŝitajn lokojn.

Krome, la Ŝanhaja Popularscienca Filmstudio jam komencis produktadon de filmo pri la vivo de simio-homo, ek de majo ĉijare, en kunlaboro kun la Instituto pri Antikvaj Vertebruloj de la Ĉina Scienca Akademio. La filmo estos el kvin scenoj, daŭranta 40 minut-

ojn kaj finfarita probable en oktobro.

### La 4-a listo de simpligitaj ĉinaj ideografiaĵoj

Estas komune publikigita de la Reforma Komisiono de la Ĉina Skribado kaj La Ministerio de Kulturaj Aferoj, por esti uzata en gazetoj kaj libroj ek de 15 julio ĉijare. Ĝi konsistas el 92 simpligitaj ideografiaĵoj kaj kune kun la 13 listoj publikigitaj en 1956 kaj 1958, formas nun jam tutan de 517.



Elektro-transmisia dizela lokomotivo proviras sur Ŝanhajo-Nankina Fervojo.




Muntejo en aeroplana fabriko.


Koakson ni pliproduktas ankaŭ per indiĝena koaksoforno.



Laminatilo provfabrikita de Ŝenjan-a Fabriko de Pezaj Maŝinoj por Tiangin-a Ŝtala Fabriko.



Alteprecizaj surfacaj mueliloj manufakturitaj de Ŝanhaja Maŝino-Fabriko.







## Nova Urbo

*Lignogravuraĵo de Giang Ĝeng-hong la premiito de ora medalo dum la VII-a Junulara Festivalo en Vieno*



Kan  
Vena  
Li




## Alporti Manĝon en Neĝa Nokto

*Ĉina pentraĵo de Jang  
Ĝi-guang la premiito de  
ora medalo dum la VII-a  
Junulara Festivalo en  
Vieno*

o kaj Danco  
en Kamparon


ogravuraĵo de Ĝang Ĝong-gjun





- 1 Rikoltado de koton.
- 2 En frukto-ĝardeno.
- 3 Ankaŭ ĉevalrikoltilon ni uzas krom falĉilo kaj kambajno.
- 4 En kolzokampo.
- 5 Bredo de Pekinaj anasoj.

*(Fotoj de Hinhua-novajagentejo.)*





# HIERAŬ

(*Humora dialogo*)

## *Kolektive verkis Ĝaŭ Ĝong, Ĉang Baŭ-hua k Ĝong Ji-bing*

“Humora dialogo” estas unu el la popularaj formoj de la tradicia kanta kaj rakonta arto de Ĉinio kaj ankaŭ de la ĉina satira literaturo. Kutime ludas du personoj, sed, en iuj okazoj, ankaŭ unu aŭ pli ol du. La aktoroj ĝenerale ne sin alivestas, nek ian akcesoraĵon bezonas kvankam kelkfoje ili tenas en la mano eluzitan faldeblan ventumilon el papero. La prezentado iras ĉefe en dialogo, kelkfoje akompanata de simplaj gestoj. Unu el la aktoroj rakontas komikan historion aŭ respondas interesajn demandojn; la alia faras al li demandojn aŭ intermetas demandajn flankdirojn, por pli elstarigi la humorecon de lia prezentado kaj ĝin fari pli ridinda. La lingvo de la dialogo ĝenerale estas facila kaj flua, simpla kaj preciza, malmultvorta kaj esprimriĉa, vigla kaj figura, kaj de strikta strukturo. Ĝia esprimmaniero similas al tiu de la karikaturo, kiu troigas sed la verecon ne perdas; pro tio ĝi povas elfosi ridindaĵojn el la fenomenoj pri kiuj oni ofte ne atentis, kaj per ridegoj krevigi la ventrojn al la aŭskultantoj. La peco jene aperigita estas unu el la plej ŝatataj en la lasta tempo.

—La red.

A: Jam de longe mi ne vidis vin!

B: Jes!

A: Kial vi ne iras al mia hejmo?

B: Tempo mankas.

A: Sed mia onklo ofte mencias pri vi.

B: Via onklo?

A: Jes. Vi vidis lin kiam vi estis ankoraŭ knabo. Ĉu vi forgesis?

B: Ha! Sed kial mi neniam lin vidis, kiam mi estis lastajn fojojn en via hejmo?

A: Li konstante restis en la hospitalo.

B: Do mi devas lin viziti. Kian malsanon li havas?

A: Mensan malsanon.

B: Jam mi ne iros, por ne ricevi tie batojn!

A: Li estas jam resanigita!

B: Pro kio falis sur lin la mensa malsano?

A: Ve, estas dolore tion rememori. Estis en la jaro 1948, kiam Ĉinio ankoraŭ ne estis liberigita. Mia onklo vivis tiam kun sia edzino en la kamparo.

B: Oh, li estis kamparano!

A: Li dungite laboris por bienulo, suferis malsaton kaj froston, ricevadis frapojn kaj insultojn. Fine, ne vidante elirejon, li venis al Pekino, al mia paĉjo.

B: Kiel iris la vivo de via familio?

A: Kiel? Tiam mia paĉjo kaj mia panjo ambaŭ kuŝis malsanaj.

B: La familia vivtenado devis do dependi de vi!

A: Mi estis tiam nur malgranda knabo.

B: Kion do fari?

A: Ni vivis de lombardado kaj vendado de niaj havaĵoj. Poste restis nenio por lombardi kaj vendi, kaj alvenis tiumomente mia onklo.

B: Do via onklo devis serĉi okupon.

A: Kie serĉi dum abundis senlaboruloj?

B: Li povis pruntepreni kelkan monon por kolporti.

A: Pruntepreni? Ĉu malriĉulo povus havi amikon riĉan? Diru, de kiu li povus monon prunti el la najbaroj kiuj loĝis kun ni en la sama korto? En la orienta domo loĝis akriĝisto de tondiloj. . . .

B: De li ne eblis prunti.

A: En la suda loĝis, jes, komercisto. . . .

B: Ja, de li estis eble.  
 A: Tamen li komercis per malgrandajoj.  
 B: Kion li vendis?  
 A: Orempurigilojn.  
 B: Tio estas tro malgranda!  
 A: En la okcidenta loĝis Sekciestro Vang, diplomito el universitato. . . .  
 B: Ha, al sekciestro mono ne devas manki!  
 A: Li gajnis sian vivopanon per vendado de kalendaroj.  
 B: Sekciestro vendis kalendarojn?  
 A: Li estis nomata Sekciestro\* Vang.  
 B: Ah, kia nomo!  
 A: La nura riĉulo ĉe ni estis la domluigantino.  
 B: Li pruntu do de ŝi.

\* En la ĉina lingvo lia nomo prononciĝas simile al la vorto por 'sekciestro'.

A: Jes, ĵus kiam mia onklo eliris al ŝi, ŝi jam komprenis kaj diris: "Do, vi monon bezonas, ĉu ne? Ne estu maltrankvila. Mi donas al vi unue cent mil juanojn. Se ne sufiĉos, venu preni ankoraŭ!"  
 B: Kia bonkoro!  
 A: "Sed la interezo estos kvin procentoj."  
 B: Kun interezo! Ĉu kontraŭ cent mil ĝi estas kvin mil?  
 A: Ne, kvindek mil po monato.  
 B: Diabla procentego!  
 A: Mia onklo prenis la monon kaj ĝin kalkulis "Nu, sinjorino, mi petis cent mil, sed ĉi tie troviĝas nur kvindek mil." "Jes, prave, ĉar mi anticipu subtrahis la interezon por la kuranta monato."  
 B: Kio? Jam la interezon subtrahis?  
 A: Kun mono en la mano, mia onklo meditis kaj meditis, ĉiam pli maltrankviliĝante: "Tiel terura estas la interezo, kiamaniere mi povos min liberigi de la ŝuldo kiam venos la tago por la pago?" Li tuj sin returnis al la domluigantino por redoni la monon: La maljunulino ekmontris grandan kontenton, dirante: "Brave! Monon oni ĉiam devas prunti al tiaj personoj kia estas vi, kiu, ĵus preninte la pruntajon, jam venas pagi la interezon por la sekvonta monato!"  
 B: Ah!?  
 A: Tion aŭdinte, mia onklo tre miris: "Kio? Tiel malaperos do la cent mil juanoj sen ŝanĝi sian lokon? "Ne havante alian rimedon, li fine depruntis la monon kun dentoj kunpremitaj. Poste, sekciestro Vang venis en nian ĉambron kaj demandis: "Onklo, kial vi ĝuste elektis la domluigantinon por monon prunti? Ŝia filo havas kromnomon Loka Imperiestro. Neniu kuraĝas rilatiĝi kun ili. Mi aĉetis rikŝon en la jaro kiam mi finis mian studon en la universitato, sed, ĝin tirinte nur dum du tagoj, mi sangon kraĉis. Onklo, havu sub via dispono mian rikŝon!" Mia onklo estis al li tutkore dankema.  
 B: Tamen ekzistis bonulo!  
 A: Mankis al mia onklo sperto en la okupo de rikŝotirado. La tutan matenon li vagadis en stratetoj kun la rikŝo, sed neniu veturis per ĝi. La stomako ronkis pro malsato, kaj li devis aĉeti pecon da maiza pano per kvincent juanoj.  
 B: Kvincent juanoj por peco da maiza pano?



Ven Ŝan:

## Luna Nokto

Al mia kabano vojeto zigzagas,  
 Laŭ plektobarilo, tra bela arbaro.  
 Aliru lun-nokte ni ambaŭ l' riveron  
 Por ĝui sub arbo falantajn petalojn.

Lignogravuraĵo de Vu Ĵan  
 Trad. Honfan

A: La juano de Kuomintang ja malmulte valoris! Kun granda ŝparemo li manĝis nur duonon de la pano kaj la alian duonon metis en sian poŝon. Post tio li iris al Donggiaŭminhiang, la kvartalo de imperiistaj ambasado-rejoj. Apenaŭ li haltigis tie la rikŝon, aperis antaŭ li policano kaj insultis: "Ĉu vi opinias ke ĉi tie estas loko por vi? Eh? La fremdlandanoj veturas per aŭtomobiloj! Ĉu vi ankoraŭ ne volas foriri?..." Li levis sian bastonon kaj, krak! rompis kotŝirmilon de la rikŝo. Mia onklo tuj prenis sian rikŝon post sin kaj forkuris.

B: Li certe ricevus batojn, se li ne kurus for.

A: Nun jam vesperiĝis. Li ekmemoris ke hejme oni estas manĝon atendantaj.

B: Aĉetu li iom da faruno.

A: Li iris al farunvendejo, lokis ekstere la rikŝon, elpoŝigis la pruntitajn kvindek mil juanojn, prenis el ili sumon por tri ĝinoj\* da faruno kaj enpaŝis la vendejon. "Sinjoro mastro, pesu al mi tri ĝinojn da faruno." La vendisto ekrigardis lian monon kaj diris: "Ĉu vi freneziĝas de malriĉeco, intencante aĉeti tri ĝinojn per sumo nur por du?" "Mia mono estas ja por tri ĝinoj!" "Ne, la prezo altiĝis!"

B: Ho, kiel rapide altiĝis la prezo! Aĉetu do du ĝinojn!

A: "Sed kie estas mia sako?" Mia onklo forgesis ĝin kunporti kaj eliris al la rikŝo, el kies suba kesto li prenis du paperfoliojn kaj revenis en la vendejon. "Pesu do du ĝinojn!" "Du ĝinojn? Nur unu!"

B: Ĉu via onklo ne pagis por du ĝinoj?

A: La prezo altiĝis pli!

B: Dum la momento por alpreni la paperfoliojn?

A: Mia onklo demandis: "Kial ĝi altiĝas tiel rapide?" "Sensenca babilaĉo! Ĉu vi aĉetas aŭ ne? Se ne, la prezo pli altiĝos ankoraŭ."

B: Ah?!

A: Mia onklo pripensis kaj decidis: Aĉetu do! Alie, mia sumeto eĉ ne sufiĉos por faruno por prepari pelveton da gluo! Kun la restanta mono en unu mano kaj la aĉetita faruno en la alia, mia onklo paŝis el la vendejo.



Atendo pri pramo

Lignogravuris Ŝju Kuang

Renkonte al li venis vundita soldato, kun lambastonoj sub la brakoj kaj medikamenta boteleto en mano, sin ĵetante rekte kontraŭ li.

B: Intenca provoko!

A: La soldato jetis teren la boteleton, pa! ĝi tuj dispeciĝis. "Kial vi koliziis kun mi, eh? Rigardu, jam frakasita estas la boteleto! Ĝi entenis medikamenton por injekto, importitan el Usono!"

B: Pura friponado!

A: "Kompensu al mi!" Dirante, la soldato alproksimiĝis al mia onklo kaj intencis rabi lian monon. Mia onklo petis: "Via soldata moŝto, tiun, tiun ĉi monon vi ne forprenu..." "Kial ne, donu al mi!"

B: Kia vundita soldato!

A: Mia onklo ploris korsirate. Apude, iu lin konsolis: "Lasu, maljunulo! Kion vi povas fari kontraŭ vundita soldato! Memoru ekde nun: kiam vi vidas soldaton, lin ĉiam evitu!" "Ve! Kie estas la justeco?!..." Mia onklo apenaŭ finis siajn vortojn, venis alia kaj

\*Ĝino = 1/2 kilogramo.



- ŝtopis al li la buŝon per manplato, avertante: "Ne babilu pri la ŝtataj aferoj!"
- B: Eĉ paroli estis malpermesate?
- A: Mia onklo turnis sian kapon kaj rigardis. . . .
- B: Kion?
- A: Malaperis la rikŝo!
- B: Kian tagon li pasigis!
- A: Mia onklo eksidis sur la peronon kun okuloj rigidiĝintaj, nenion dirante.
- B: Lin dolorigis la koro.
- A: Malordiĝis liaj nervoj!
- B: Ho ve, persekutita ĝis freneziĝo!
- A: En tiu tempo, ne eblis por ni lin kuracigi kaj ni devis lin lasi vagadi sur la stratoj ĝis kiam, post la liberiĝo de Pekino, laborantoj de la Komitato de Milita Kontrolo lin sendis al la hospitalo de mensaj malsanuloj.
- B: Do lia malsano estis sufiĉe grava.
- A: Li fariĝis tute senkonscia. En la hospitalo li timis la homojn. Lia malsano pli graviĝis ĉiam kiam li iun vidis.
- B: Ĉar liaj nervoj estis tro forte incititaj.
- A: La hospitalo faris ĉion eblan por lin kuraci. Iun tagon, li subite reakiris la konscion kaj demandis al si: "He, kial mi troviĝas ĉi tie? Ĉu mi ne estas batita de la soldato? Ho, oni min sendis al hospitalo?"
- B: Jam klara refariĝis la kapo!
- A: "Sed kiam tio okazis? Hieraŭ?"
- B: Hieraŭ?
- A: Nur la tagoj li ankoraŭ malbone distingis. "Kredeble okazis hieraŭ. Kiom mi devas pagi ĉiutage en tiel luksa hospitalo!" Tiutempe la flegistino portis al li la manĝon. (Li imitas la kaŝan enŝovigon de la flegistino.)
- B: Kion tio signifas?
- A: Ĉu li ne timis vidi la homojn! Metinte la manĝon en la ĉambro, ŝi estis preta eliri, kiam mia onklo ŝin alparolis: "Doktorino, mi jam resaniĝis kaj povas elhospitaliĝi." Plena de ĝojo pro la rekonsciiĝo de la malsanulo, la flegistino tuj elflugis. Post momento, alvenis la direktoro de la hospitalo kaj kuracistoj. La direktoro lin salutis: "Onklo, kial vi ne prenas la manĝon?" "Ho, ne, mi havas en mia poŝo ankoraŭ duonpecon da maiza pano!"
- B: Li ankoraŭ memoris sian maizan panon!
- A: "Doktoro, kiu min sendis ĉi tien hieraŭ?"
- B: Ankoraŭ hieraŭ!
- A: Ĉiuj eksplodis de rido. La direktoro diris: "Ne hieraŭ, onklo! Vi restas ĉi tie jam dum dek jaroj!" Mia onklo estis ege surprizita. "Kio? Dek jaroj?" "Jes, ni kuracis vin per ĉiuj metodoj, ĉinaj kaj Eŭropaj: injekto, medikamentado, akupunkturo, kaŭterizo, elektrototerapio. . . ." Sed mia onklo pensis en si: "Trompajo por ĉantaĝi!"
- B: Por ĉantaĝi?
- A: "Doktoro! Sed mi ne estas riĉulo!" La direktoro respondis: "Estu trankvila, onklo! Restu pli da tagoj por sufiĉa ripozo kaj poste ni vin akompanos hejmen!" Post la foriro de ĉiuj, ju pli mia onklo pensis, des pli stranga ŝajnis al li la afero. "La plej simpla solvo: foriri!" Kaj li elŝteliĝis sola el la hospitalo.
- B: Aja! Sed ĉu li rekonis la vojon?
- A: Unue li iris al Pordego Ĉianmen. Enirinte la pordegon, li ne kuraĝis daŭrigi antaŭen.
- B: Pro kio?
- A: "Ĉu tie estas Tiananmen? Eh, sinjoreto!" li demandis al preterpasanta juna pioniro kun ruĝa koltuko.
- B: Kio? Sinjoreto?
- A: "Ĉu tie estas Tiananmen?" "Jes, avo!" "Ĉu la ĝardeno kaj la altaj domoj tie estas konstruitaj de fremdlandanoj?"
- B: De fremdlandanoj?
- A: La knabo lin respondis: "Avo, ni mem ilin konstruis." "Ni mem?" La knabo diris: "Jes! Rigardu, ĉi tie staras la Monumento de Popolaj Herooj, por memorigi la revoluciajn martirojn." La vorto "revoluciajn" konsternis mian onklon kiu rapidis ŝtopi per manplato la buŝon de la knabo kaj lin atentigis: "Ne babilu pri la ŝtataj aferoj!"
- B: Ankoraŭ "ne babilu pri la ŝtataj aferoj"!
- A: La knabo ekridis kaj klarigis al li: "Avo, ni devas scii, la aferojn de la ŝtato. . . ." "Ho, iru for! Tuj!" La knabo levis sian manan por saluti lin laŭ la pionira maniero: "Ĝis revido!" Tio tamen ektimigis mian onklon, kiu diris: "Ĉu vi volas min bati?"
- B: Neniel timinda tio ja estas!
- A: Lia elŝteliĝo el la hospitalo kaŭzis al ni grandan maltrankvilon.
- B: Kial?
- A: Oni telefonis al ni el la hospitalo ke li jam resaniĝis. Sed kiam ni veturis per taksio al

la hospitalo, oni diris ke li eliris sola. Nun bone, la hospitalo sendis por lin serĉi, kaj ni lin serĉis ankaŭ.

B: Kie vi povis lin trovi?

A: Facile, ĉar li surstratiĝis en noktvesto. Atinginte Tiananmen mi tuj lin rimarkis. Eltaksiĝinte mi alpaŝis al li kaj lin salutis: "Onklo, ĉu vi min rekonas?" "Fera Ovo."

B: Hm! kial li nomis vin per via infana nomo?

A: "Vi, vi estas Fera Ovo?" Mi respondis: "Jes, mi estas Fera Ovo!" "Ne! Kiel vi povas kreski tiom alta post nur unu nokto?" Mi diris: "Ni iru hejmen kaj mi klarigos al vi. Enaŭtiĝu!" "Ah? Ni veturos per aŭto?" Li ja neniam antaŭe per aŭto veturis. "Eniru rapide!" Dirante mi puŝis lin en la taksion. Tie sidante li ankoraŭ murmuradis: "Ĉu ni povas veturi per aŭto?" Mi respondis: "Nun ĉiu ajn tion povas! "Se ĉiuj veturas per aŭto, ĉu la rikŝotiristoj ne perdas sian panon?"

B: Li ankoraŭ ne forgesis la rikŝotiradon!

A: Nun la ŝoforo intermetis: "Onklo, ĝuste mi estis antaŭe rikŝotiristo."

B: Jen, li nun kondukas aŭtomobilon!

A: Ju pli mia onklo aŭskultis, des malpli li komprenis. Kiam la taksio atingis nian hejmon, la ŝoforo apogis lin elaŭtiĝi kaj iri en la kortopordon. Mia onklo diris al la ŝoforo: "Dankojn, frato! Nun, min ne prizorgu jam, sed atentu ke via aŭto ne perdiĝu!"

B: Hm! ĉu la aŭto povas perdiĝi!

A: Antaŭ sia domo li tamen ne kuraĝis enpaŝi.

B: Ĉu li ĝin ne rekonis?

A: Post la liberiĝo de Pekino, ni transloĝiĝis en la domon de la domluigantino, ĉe la norda flanko. Ĝi konsistas el tri ĉambroj, grandaj kaj helaj, provizitaj per novaj mebloj.

B: Jes, ŝanĝiĝis la aspekto!

A: Ĉirkaŭrigardinte longan momenton, mia onklo demandis: "Por kio ni venis ĉi tien?" Mi respondis: "Ĉi tie estas nia hejmo." "Nia hejmo?" Mi rediris: "Ĉu vi ĝin forgesis? Loĝis ĉi tie la Loka Imperiestro". Tion aŭdinte mia onklo tuj koleriĝis: "Oh, nun ĝi apartenas al vi? Diru, kiel vi akiris la riĉecon?"

B: Tio neniel rilatas kun la akiro de riĉeco!

A: "Aŭskultu, ni ne devas fari malbonon!" Mi respondis: "Onklo, ĉu vi ankoraŭ memoras la tagojn kiam ni suferis de malsato?" "Ho, certe mi ilin memoras! . . ." "Antaŭ kiom da jaroj tio estis?" "Ĉu ne hieraŭ? . . ."

B: Ankoraŭ hieraŭ!

A: Mi diris: "Onklo, vi vivis en la hospitalo jam dek jarojn!" "Dek jarojn? Eĉ dudek jarojn ne povus estiĝi tiel granda ŝanĝo!" Mi daŭrigis: "La okazintaĵoj en la lastaj dek jaroj ne estas elrakontebaj dum mallonga tempo. La Loka Imperiestro jam estas metita sub kontrolo." "Ah? Oni povas eĉ kontroli Imperiestron?" Mi diris plu: "Rigardu, ĉiu el niaj familianoj havas okupon. Onklino estas en Hejmo por Maljunuloj en la vilaĝo kaj tie ĝuas feliĉan vivon." "Ĝuas feliĉan vivon? Ĉu mi estas en sonĝo?"

B: Hm! Tute realaĵo!

A: Dum nia interparolado, revenis sekciestro Vang. "Aha, onklo! Vi elhospitaliĝis! Ĉu vi min rekonas?" "Ve, Sekciestro Vang, mi petas vian pardonon!"

B: Pro kio?

A: "Mi perdis vian rikŝon!" Sekciestro Vang ekridis: "Forgesu la pasintaĵojn. Nun ni ĉiuj vivas tre bone, ĉu ne? Jen mi, mi laboras en la Oficejo de Konstruado." Ah, tie vi vendas la kalendarojn?

B: Hm!

A: Mi diris: "Nun li estas jam vera sekciestro!" Vang turnis sin al mi: "Iru kun via onklo

## Forpelo de la Pesto

Lignogravuris He Lin



sur la stratojn por iom rigardi la urbon.”  
Post ekpenso mi samopiniis: “Jes, ni faru  
promenadon sur la stratoj! Sed, onklo, vi  
unue demetu la noktveston!”

B: Ha, ankoraŭ kun la noktvesto!

A: Mi proponis al li: “Kunportu iom da mono!”  
“Ne, por kio mi monon portas se mi nenion  
aĉetos?” “Estos pli oportune kun iom da mono  
en la poŝo.” “Do bone, donu al mi du mil  
juanojn!”

B: Kio? Du mil?

A: “Havu nun dek juanojn.” “Nur dek? Eĉ peco  
da maiza pano kostas kvincent!” “Prenu, ĝi  
ne estas la pasinttempa bankbileto de Kuo-  
mintang!”

B: Prave! Nun la mono valoras!

A: Atinginte Vangfuging-straton, ĵus kiam ni estis  
pretaj transiri la straton, li tiris mian manon  
kaj kuris returnen: “Venas policano!” Mi diris:  
“Tio estas popola policano!” “Kia ajn



*Forgeso pri la infano*  
— Mongola —

*Geedzoj kunsidas en hela lamplumo,  
Vizaĝ-al-vizaĝe kun libro kaj plumo.  
La buŝo laŭtleĝas, kaj skribas la mano.  
Jen ili forgesas eĉ pri la infano.*

**Bildo de Ĝang Jang**



*Altaj, dikaj la grenplantoj*

— Miaŭa —

*Altaj, dikaj la grenplantoj,—  
Jen tig-ŝalm' en oportuno.  
Sonu kant' de geamantoj  
Al popola komunumo.*

**Bildo de Deng Ke**



policano li estu, li ja portas en mano bastonon!"

B: Ĝi estas uzata por direkti la aŭtomobilojn.

A: Mi diris al li: "Onklo, rigardu, la policano subapogas maljunulinon kaj portas por ŝi grandan pakajon." "Ah, ŝi estas lia patrino?"

B: Hm! La popolaj policanoj traktas ĉiujn tia-maniere!

A: Ni atingis la Grandan Magazenon. Mia onklo ekmiris: "Ho, kia vendejgo, eĉ pli granda

ol Ĵujfuhiang\*! Fera Ovo, kia *hiang* estas ĝi?" Mi respondis: "Ĝi estas la Granda Magazeno!" "Kiu estas ĝia posedanto?" Mi diris: "Ni ĉiuj!"

B: Jes, ĝi apartenas al la tuta popolo!

A: Mi diris: "Ni eniru!" "Ne, oni nin elpelos!"

\* Unu el la plej grandaj privataj vendejoj de silkaĵoj kaj peltoj antaŭ la liberiĝo. La nomoj de pluraj tiaj vendejoj finiĝas per 'hiang'.

## De l' sama familio


— Tibeta —

Ne samloke ŝvebas nuboj sur ĉielo,  
Sed ja ĉiuj flugas ĉirkaŭ sama suno.

Ne samloke fontas riveretoj kaj riveroj,  
Sed kuniĝas ĉiuj fine en la oceano.

Ne samloke vivas tibetan', mongol' kaj han-o  
Sed de l' sama familio ĉiu estas ano.

Bildo de Ju Hua



## Pri la skriba lingvo\*

— Lisua —

La vivon de l' prapatroj  
Transdiris buŝ' al buŝo,  
Perdiĝis la plejparto  
Pro vol-ne-vola fuŝo.  
Sed ni la vivon nunan  
Registras per-litere,  
Por ke la nepoj niaj  
Memoru ĝin parkere.

Bildo de Ki Gie

Trad. Laŭlum

\* Post la liberiĝo kreiĝis skriba lingvo por la lisu-oj dank' al la helpo de la Centra Popola Registaro.



## Ĉiam pli juniĝas la maljunuloj

*Modlis el argilo  
Ĝang Ĝing-joŭ*

B: He, li estis jam timigita de la elpeloj en la pasinteco.

A: Mi kuraĝigis lin: "Rigardu, eniras tiom da personoj, samaj kiel ni, kaj neniuj el ili estas elpelata." Nur nun li enpaŝis la pordon kaj ĉirkaŭrigardis: "Ho, kia homa svarmo! Fera Ovo, bone tenu la monon!"

B: Pro kio?

A: "Atentu, ke oni ĝin ne forrabu!" Mi respondis: "Estu trankvila, rabisto nun jam ne ekzistas!" Sur la dua etaĝo mi proponis: "Aĉetu por vi paron da ŝuoj!" "Mi aĉetos ĉe Tiankiaŭ, ĉar ĉi tie varoj estas karaj."

B: Hm! ĉie ajn la prezo estas la sama!

A: Aŭdinte ke ni aĉetos ŝuojn, la komizo tuj elprenis kaj montris al ni ses aŭ sep parojn. Mia onklo diris: "Sinjoro mastro, mi aĉetos nur unu paron. "La komizo respondis: "Ne gravas se vi aĉetos eĉ neniun. Rigardu trankvile!"

B: Li elektu do!

A: Post provo, mia onklo diris: "Nu, tiu ĉi konvenas al mi. Fera Ovo, pagu tuj, tuj!"

B: Kial tia urĝeco!

A: "Post momento la prezo altiĝos!"

B: Li timis ankoraŭ la prezaltiĝon!

A: Aĉetinte la ŝuojn, mi konsilis al li: "Ripozu iom!" Mi kondukis lin al la ripozĉambro, kie junulo ekstaris kaj diris: "Onklo, sidiĝu ĉi tie!" Mia onklo sidis tie tre maltrankvila. Li elpoŝigis sian monon kaj diris: "Aha, ĝi restas ĉi tie!"

B: Li ankoraŭ timis ĝin perdi!

A: Mi diris: "Onklo, atendu min, mi iros preni glason da akvo por vi." Sed kiam mi revenis

kun akvo, li estis kuranta eksteren. Mi demandis: "Onklo, por kio vi kuras?" "Tie troviĝas soldato!" "Hm! Li estas ano de Liberiga Armeo!"

B: Nenia kaŭzo por timi!

A: "Oni diris prave: kiam vi vidas soldaton, lin ĉiam evitu!" Mi klarigis: "La Liberiga Armeo estas armeo de la popolo. . . ." "Ne, ne diru plu, li alkuras!"

B: Ah, li alkuris?

A: Jen mia onklo kuris antaŭe, la armeano lin postsekvis, ĝis la enirejo de la dua etaĝo, amaso da homoj lin ĉirkaŭis.

B: Interesa spektaklo!

A: Mia onklo staris tie, kaj la armeano alparolis lin: "Onklo, por kio vi kuris? Jen!" "Ho?"

B: Kio?

A: "Vi perdis vian monon!" Mia onklo ekpalpis sian poŝon kaj kriis: "Vere! . . ." Li etendis la manon por ricevi la monon, sed tuj ĝin retiris kaj diris: "Soldata moŝto, havu ĝin do por via bezono!"

B: Kia absurdaĵo!

A: Ĉiuj ridis. La armeano diris: "Onklo, kiel mi povas havi monon vian!" Mia onklo estis tiel kortuŝita, ke larmoj falis el liaj okuloj. Tiumomente la laŭtparolilo eksonis: "Atentu, gekamaradoj! Oni trovis unu font-plumon kaj unu monujon. Tiuj, kiuj ilin perdis, venu al la tria etaĝo por ilin preni, al la tria etaĝo por ilin preni!" Mi diris: "Onklo, ĉu vi aŭdis? Kiu ajn perditajo estas retrovebla." Mia onklo tuj sin turnis kaj kuris al la tria etaĝo. Mi vokis lin: "Onklo, kien vi iras?" "Mi iras rigardi, ĉu estas tie mia rikŝo."

**Trad. Yang Yongsen**

# Ĉajvang kaj demono

— Popola rakonto el Tibeto —

**A**NTAŬ longe, en iu montvalo ne malproksima de la Jalucanpo-rivero estis malriĉulo, nomata Ĉajvang. Gepatrojn li perdis jam de la infanaĝo, kaj li havis nek edzinon, nek parencojn kaj amikojn, Lin akompanis nur liaj melkbovino kaj malgranda hundo.

La ruĝa suno malrapide rampis super la monton, nur kiam aŭdiĝis la kanto de Ĉajvang el hordea kampo. Same en la vespero estis lia kanto, kiu akompanis la sunon trans la okcidentan monton, kaj venigis la lunon.

Kvankam Ĉajvang havis jam ĉirkaŭ 35 jarojn, tamen li ankoraŭ timis demonon. Li ĉiam rapide forfuĝis timigita, kian ajn demonon li vidis. Sed li ĉiam diris en si: “Se mi estus dio reganta demonojn, mi nepre cindrigus ĉiun el ili, ne permesante ilin despoti super homoj senkulpaj.”

Iun vesperon meze de la monato laŭ Tibeta kalendaro, kiam la luno simila al arĝenta disko ĵus sin ŝovis super la monton, la malgranda hundo de Ĉajvang ekbojis furioze, kvazaŭ vipata de iu. Tuj poste, “klak, klak”, aŭdiĝis sonoj de ĉevalhufoj ĉiam proksimiĝantaj. Ĉajvang klare vidis en la lunlumo: sur la ĉevalo sidis viro vestita en brodatlaso, sed lia fizionomio ne estis klare videbla.

“Ah, demono, certe ne homo!” pensis Ĉajvang kun batanta koro kiel tamburado.

Dume, en palpebruma daŭro, la demono jam desaltis de la ĉevalo, kaj “ton”, per piedbato malfermis la pordon. Ĉajvang timigita sin klinis antaŭ la demono kaj montris la langon\*, kaj rapide prezentis al ĝi sian tutan provizon de kremoleo\*\*. Tiukaze, la demono kun malica rido diris al Ĉajvang:

“Hodiaŭ mi ja volis elsuĉi vian sangon, kaj formanĝi vian koron, tamen nun mi pardonas vin provizore, ĉar vi estas obeema kaj respektplena al mi. Sed post sep tagoj mi ankoraŭ venos kaj vin manĝos. Tion dirinte la demono tuj saltis sur la ĉevalon kaj galopis for.

\* Respekta esprimo de tibetanoj.

\*\* Oleo farita el kremo, ĉefa nutraĵo por tibetanoj.

Tiun nokton, Ĉajvang turniĝadis sur la lito jen dekstren, jen maldekstren kaj longe longe ne povis endormiĝi. Fine, li decidis: “Mi ne devas atendi morton senfare. Sed nepre devas forkuri kaj daŭre vivi. Mi forkuru de tie ĉi morgaŭ frumatene por serĉi feliĉon en loko sen demonoj. . . .”

La sekvintan matenon, Ĉajvang forlasis la hejmon kun la bovino kaj la hundeto. Li iradis laŭ serpentumanta rivereto al loko tute fremda. Ekde tiu tago, la suno kaj la luno ne plu prilumis la valon, ĉar tie ne plu aŭdiĝis kantvoĉo de Ĉajvang.

Iris kaj iris. Post du tagoj kaj du noktoj da senĉesa irado, li ekvidis domon kun ruĝlakita pordo. Li volis eniri por peti tranokton, sed li rememoris, ke dompordoj de demonoj estas ja ruĝiakitaj. Tial li rapide foriris.

Pasis ankoraŭ kvin sinsekvaj tagnoktoj da senĉesa irado, li ekvidis blankan domon duetaĝan. Tiam li kredis, ke li jam liberiĝis el la manoj de la demono, kaj kuraĝe eniris en la domon. Sed kiu ja scias, ke enirinte la pordon, li tuj vidis tiun saman demonon, de kiu li multe klopodis por fuĝi.

La demono sidis meze en la domo kaj malice ridaĉis kontraŭ li. Dum tiu vivdangera kaj dilema momento naskiĝis al Ĉajvang subite intrigo: li do sentime iris al la demono kaj diris:

“Hodiaŭ estas la dato fiksita de vi por min manĝi, mi ja devus vin atendi hejme, sed por ke vi ne tro laciĝu pro iro-reiro, mi mem venas al via domo. . . .”






“Ha, ha, vi estas tiel obeema kaj respektplena al mi, mi do decidis pardoni vin, kaj lasi vin resti ĉi tie eterne por bredi miajn ĉevalojn kaj bovojn. Mi tamen volas demandi vin, kie estas via koro, ke vi kondukas tiel honesta?” diris kontente la demono.

“Mia koro lokiĝas ĝuste en la mezo.” diris Ĉajvang montrante la bruston. “Kaj kie estas la via?”

“Mian koron mi metis en incensujon,” respondis la demono kaj tuj ordonis al Ĉajvang: “Selu senprokraste la ĉevalon, mi rajdos sur ĝi al norda vilaĝo kaj tie formanĝos ĉiujn kamparanojn kaj ĉiujn brutojn.”

Post foriro de la demono, Ĉajvang faris grandan fajron per kolektitaj brullignoj, verŝis kremoleon sur ĝin, kaj poste elprenis la koron de la demono el la incensujo, kaj ĝin ĵetis en la




Lin Hong-hi, kiu gajnis la unuan premion por skulptarta fako de malpez-industriaj produktadoj en jaro 1958, per sia kreaĵo, sceno el la opero “15 ĉenoj da moneroj”, estas porcelana modelisto de la “Fenghi-a Unua Manufakturo de Porcelanaĵoj” en Ĉaŭ-an-gubernio de Guangdong-provinco. Inter liaj aliaj porcelanaj skulptaĵoj estas fame konataj ankaŭ “Prometeo”, “Dong Cun-juj”, “Diligenta laborado kaj lernado”, sceno el “Rakonto pri okcidenta ĉambro”. Tiu lasta kaj sceno el “15 ĉenoj da moneroj” estas filmitaj en kolora dokumenta filmo kaj nemalmultaj el liaj skulptaĵoj estas ekspoziciataj en Muzeo de Guangdong-provinco.

Lin Hong-hi estas juna laboristo 30-jara kaj travivis multe da malfeliĉoj antaŭ la Liberiĝo. Lia pliaĝa frato estis mortigita de japana invadarmeo, malaperis ankaŭ lia bofratino, kaj liaj avino kaj gepatroj mortis pro malsato. Li mem vagadis

### Transporti bataton

skulptis juna metiartisto Lin Joŭ-ŝun



Ĉen Ging-taŭ :

# Ling Hong-hi

de sia naskiĝloko Giejang-gubernio ĝis Ĉaŭ-an kaj tie post zigzagaj vojoj fariĝis helplaboristo en porcelana manufakturo “Hongfa” en Fenghi.

### Penega Kaj serioza studo

En la nomita porcelana manufakturo dum-tage li havis laborojn turnadi radon, doni akvon, ĝustigi modlajojn kaj modli statuetojn, vespere li devis pisti kaj mueli argilon. Krom ĉi tiuj aferoj, li ellernis nenion alian. Kaj veran lernadon de porcelana skulptarto li komencis nur post la Liberiĝo.

Foje en printempo de la jaro 1950, inspirite de porcelana skulptaĵo “Ok Ĉevaloj”, produktita de porcelana manufakturo Songhing, li tuj decidis ankaŭ fari skulptaĵon kun la sama temo. Komence li prenis modelojn el bildoj de bildgazeto, sed ne kontentige. Poste li ĉiuvespere iris al garnizono de kavalerio de la Popola Liberiga Armeo por observi militajn ĉevalojn. Reveninte hejmen li skulptis laŭ observitaj figuroj. Dum 8-9 sinsekvaj tagoj li finfaris sian skulptaĵon, la “Ok Ĉevaloj. Oni tre alte taksis ĝin kaj Ŝantoŭ-a Kompanio de Lokaj Produktadoj

furiozan fajron. Ekde tiam la demono neniam revenis.

Kun siaj melkbovino kaj malgranda hundo Ĉajvang gaje revenis sian hejmvilaĝon. Li denove elvokas la sunon kaj venigas la lunon per siaj laborkantoj kaj transformas la aspekton de la hejmvilaĝo per siaj manoj.

**Kolektis Jou King-su  
Redaktis Ŝju Guan-ĝu**

## **—metiartisto**

decidis grandnombre mendi skulptaĵojn laŭ la modelo de li farita. Tio donis al li grandan kuraĝigon.

Lin Hong-hi tre serioze sintenas en sia laboro. Kiam li faris skulptojn “Diligenta Laborado kaj Lernado” kaj “Kadro laboranta en Kamparo” por la ambaŭ skulptaĵoj li dum po dekelkaj tagoj absorbiĝis en planado, klopodante kiel eble plej perfekte karakterizi la figurojn. Ofte li starante sola ekster la laborejo kun maldekstra mano ĉe la talio kaj dekstra mandorso tuŝanta la frunton por imiti geston de la laboranta kadro kiu viŝas ŝviton dum paŭzo. Kiam li skulptis “Diligenta Laborado kaj Lernado”, li speciale vizitis maljunulinojn kaj detale observadis ilian aspekton dum lernado. Li atentis eĉ ĉiun el la grizaj haroj, ridsulkon, dentojn k.t.p. de la maljunulinoj. Li tiel zorge kaj serioze laboras, ke li 4-5-foje faris ŝanĝojn kaj finis la skulptadon post 17 tagoj.

### **Prizorgas la Registaro, Helpas la Kunlaborantoj**

Dum sia kreado Lin Hong-hi ricevadas ĉiuf flankajn prizorgojn de la registaro kaj fervorajn helpojn de la kunlaborantoj. Dum lia skulptado la prezidanto de la sindikato, la estro de la manufakturo kaj la gvidantoj de la laborejo ofte kun granda prizorgo intervjuis, kuraĝigante lin kreadi kuraĝe demandante pri renkontitaj malfacilaĵoj kaj subtenante lin per livero de bezonataj bi-

bliografio, bildoj, ilustritaj gazetoj ktp. Lin Hong-hi ofte diris: “Varmon donas al mi la gvidantaj kamaradoj kvazaŭ vintra suno brilanta sur mian korpon, ĝi estas granda apogo kaj kuraĝigo al mia laboro.” Dum la lastaj jaroj helpate de la gvidantoj kaj kunlaborantoj de la manufakturo li rebonigis kaj kreis pli ol cent tridek porcelanajn modelojn.

En aŭgusto de la jaro 1958, kiam Lin Hong-hi komencis skulpti sian faman “Prometeon”, tre laŭdatan de niaj Sovetiaj amikoj, li renkontis ja grandan malfacilaĵon por redoni la heroismon de Prometeo dum lia vivmorta luktado kontraŭ la dia aglo, precipe li ne sukcesis solvi la problemon prezenti la luktadon per muskola streĉiĝo de Prometeo. Informiĝinte pri lia malfacilaĵo, la aŭtoritatuloj de la manufakturo tuj kontaktis kun Porcelanpulvora Manufakturo kaj Sindikato de Konstruaj laboristoj. Ĉi tiuj organizoj tuj elektis du laboristojn Vu Guang-ĉuan kaj Caj Ji-ping kun dikaj kaj fortikaj brust-muskoloj por servi al li kiel modeloj. Per tiaj helpoj Lin Hong-hi sukcesis solvi malfacilajn problemojn en sia artkreado kaj produkti tre vivecajn skulptaĵojn ofte alte ŝatatajn de la amaso.

Por pli bone evoluigi la talenton de Lin Hong-hi, en marto kaj septembro de la jaro 1958, la manufakturo dufoje sendis lin al Liling-urbo, de Hunan-provinco kaj al la ĉefurbo Pekino por lernado. Li diris: “Nia registaro tiel zorgemas pri mi — simpla laboristo, mi nepre devas lernadi diligente por pli bone servi al nia popolo per mia laborado. Post finlerno en la du urboj Lin Hong-hi ne nur multe progresis en teorio de kreado, precipe pli bone konas la vojon por servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

### **Lernado kun humileco kaj Daŭra Progreso**

Lin Hong-hi ne mem kontentas pri sia atingo. Reveninte de Peking li ofte diris: “Miaj skulptaĵoj estas komuna kreaĵo de multaj personoj, ĉar ili kreiĝis sub prizorgado de la registaro kaj helpado de la kunlaborantoj. Kiam li elfaras novan skulptaĵon, li refoje kaj refoje petas la opiniojn de liaj kamaradoj. Li finas modifon al la modelo nur kiam neniu el liaj kunlaborantoj en la laborejo povas trovi ian mankon en ĝi. Li ofte diras: “Viroj aŭ virinoj, junuloj aŭ maljunuloj — ĉiuj estas miaj instruantoj.”


Gu Ŝi-kjuan:

# La Ferpentraĵo


**E**N la homa koncepto, la pentraĵoj ĝenerale estas faritaj per pentriloj. Kiu pensus, ke oni kreas pentraĵojn ankaŭ el malmola ferpeco? Sed dum la periodo de la fino de Ming-

kaj la komenco de King-dinastioj (t.e. la lastaj jaroj de la 17-a jarcento), en la urbo Vuhu forĝisto Tang Tian-ĉi, inspirita de sia najbaro, la fama pentristo Ŝiaŭ Jun-cong, evoluigis la malnovan arton de "ferfloroj" kaj komencis fari pentraĵojn per martelo kiel peniko kaj fero kiel farbo. Li kunligis la pentristan arton kun tiu de la forĝistoj kaj elkreis vivecajn pentraĵojn el malmola fero per sia martelo. En la trezorejon de niaj popolaj metiartaĵoj li kontribuis unu el la plej altvaloraj riĉaĵoj—la fama ferpentraĵo de Anhuj-provinco.

La ferpentra arto unuigas la altgradajn teknikojn de la tradiciaj metiartaĵoj de Ĉinio, aplikante la antikvan lutan metodon de oraj kaj arĝentaj ornamadoj, la strukturon de la popolaj



Stonoj kaj Bambuoj  
(verko el King-dinastio)



Lanterno (verko el king-dinastio 1644—1911 p.K.)



papertranĉaĵoj kaj lignogravuraĵoj, kaj heredante la tradiciajn strekmanierojn de ĉinstila pentrarto, kaj formis arton kun speciala gusto. En la lastaj tri cent jaroj, aperis multaj elstaraj artistoj ferpentraj, ekzemple, Liang Zaj-bang en la tempo de imperiestro Kian-long de King-dinastio (1736-1795 p.K.), kaj Tan Ju-fu en la lastaj jaroj de King-dinastio (fino de la 19-a jarcento) ktp. Ili kreis multajn delikatajn belartajojn kun temoj de pejzaĝoj, homoj, floroj, birdoj, bestoj, insektoj kaj aliaj.

Sed dum antaŭvespero de la liberiĝo, la metiarto de ferpentraĵoj preskaŭ perdiĝis, kaj tiam troviĝis nur unu sola maljuna metiartisto Ĉu Jan-king, kiu scipovis tion fari, sed jam delonge ĉesis praktiki sian metion. Post la liberiĝo, dank' al alta takso kaj subteno de nia registaro, la arto de ferpentro akiris novan vivon. Ekde la printempo de 1956, ĝoje kaj energiplene s-ro Ĉu Jan-king ellaboris multajn delikatajn ferpentraĵojn, kaj komencas kulturi junajn artistojn. Lastatempe, la Anhuj-a Instruista Instituto alsendis al la maljuna artisto du junajn instruistojn de belarto por kunlabori kun li. Tiu ĉi popola arto iam preskaŭ mortinta, denove ekfloros brilege.

Koko kaj Bambuo  
(nova verko)



Pejzaĝo (verko de  
Liang Zaj-bang)

## Ovo-insulo en Kinghaj-lago


**E**N la okcidenta parto de Kinghaj-lago, kvar kilometrojn for de la en-fluejo de Buha-rivero, kuŝas insuleto ranidforma, ĉirkaŭ du kilometrojn longa, sur kiu sin trovas svarmoj da birdoj kaj amasoj da ovoj. Iuj bird-ovoj estas pli grandaj je duono ol tiu de ansero, aliaj estas same grandaj kiel kokovo. Tie, kie troviĝas birdnestoj, oni devas esti tre singardemaj, alie, oni facile surpaŝus sur birdovojn.

Antaŭ nelonge ni aŭtomobile veturis de Hining al la enfluejo de Buha-rivero. Kiam ni remis al Kinghaj-lago sur boatoj, tuj ni rimarkis insuleton de malproksime. Kiam ni alproksimiĝis ĝis 100-200 metroj de la insuleto, ni jam povis malklare vidi, ke la insuleto estas blanka tie kaj nigra ĉi tie. Pli proksimiĝinte ni trovis, ke tiuj blankaj kaj nigraj estas birdamasoj. Ili ekkriegis ĉe nia alveno, tiel ke nia interparolo fariĝis apenaŭ aŭdebla. Kiam ni surbordiĝis, ekflugis la timigitaj birdoj ĉiufanken. Subite, en la aero, super la lago, super la insulo, ĉie troviĝas svarmoj da birdoj. Ni troviĝas en vualo kaj sieĝo de svarmantaj birdoj.

Ni vizitis la insuleton ĝuste en sezono de ovometado kaj kovado. Ĉie sur la insuleto birdnestaroj troviĝas unu apud alia, kaj kie la nestoj estis densaj, unu nesto tuj sidas apud alia.

### Sceno sur la Ovo-insulo

*Foto de Juan Ŝaŭ-ke*



En la nestoj amasiĝis ovoj diverskoloraj. Jen blankaj ovegaj en nestoj de sovaĝaj anseroj. Ili estas pli grandaj ol anserovo, kaj ĉiu pezas pli ol 150 gm. Tiuj brunaj kun makuletoj havantaj grandecon de anserovo estas mevovoj. Sintrovias ankaŭ ovoj de kormoranoj kaj multaj aliaj birdoj, iuj blankaj aliaj buntaj. Laŭ takso, la birdovoj sur la insuleto sufiĉus por pli ol du-jara konsumado por cent homoj, se ili manĝus ĉiutage po unu ovo.

La birdoj sur la insuleto estas ĉiuj migrantaj birdoj, kiuj venas en somero kaj forflugas en vintro. Fiŝoj estas ilia ĉefa manĝaĵo, escepte sovaĝajn anserojn, kiuj nutras sin per herboj. La flugilhavaj loĝantoj de la insuleto kune vivas en paco sen interĝeno. Ĉar neniu homo antaŭe vizitis la insuleton, kaj sur ĝi nek troviĝas rabbestoj kiuj malutilus al ili, la cirkonstanco estis do tre kvieta. Cetere sur la insuleto herboj kreskas abunde kaj fiŝoj svarmas en la lago. Pro tiaj favoraj kondiĉoj la birdoj konstruis tie siajn nestojn. Iuj faris nestojn el siaj plumoj, aliaj el branĉoj kaj sekaj herberoj. Ili loĝas tie ŝajne jam de jaroj. Novaj nestoj de kormoranoj estas konstruitaj sur baze de malnovaj, etaĝo sur etaĝo.

En la pasinteco, kelkaj lokaj loĝantoj iam vizitis tiun insuleton en vintro post glaciĝo de ovoŝeloj kaj birdplumoj. Neniu iam iris tien dum somero, ĉar post la degelo la akvo estas profunda kaj ne troviĝis boatoj sur la lago. Ĉijare la Komerca Departemento de la provinca registaro fondis Ŝtatan Fiŝejon ĉe Kinghaj-lago, kaj konstruigis velŝipojn por kapti fiŝojn. En la mezo de majo oni faris unuan viziton al la insuleto. Tiam la birdoj estis ankoraŭ pli multaj ol nun. Ili faris nur unu pafon sen celado kaj ok sovaĝaj anseroj estis la insuleto, kvankam sovaĝaj anseroj estis iom malpli multaj ol en majo, sed kiam iu faris pafon

al aro de mevoj dek unu estis trafitaj kun tuta pezo de ĉirkaŭ 30 ĝin-oj.\*

La Komerca Departemento de Kinghaj-provinco jam kolektigis de la insuleto pli ol 7000 ovojn de sovaĝaj anseroj, kaj la laborantoj de Kinghaj-a Filio de Zoologia Instituto de Ĉina Scienca Akademio kaptis kelkdek kovitajn birdidojn por provbredadi. Elspezo por bredi sovaĝajn anserojn estas malalta, ĉar ili manĝas nur herbojn. La matura birdo pezas 3-4 kg. kaj liveras bongustan viandon. Ĝiaj grandaj ovoj estas ankaŭ delikata frandaĵo. Ĝia lanugo estas bona remburajo kaj fekajo bona sterko. Se la provo kortbirdigi sovaĝajn anserojn sukcesos, granda estos la ekonomia valoro.

\* 1 ĝino = 1/2 kg.

## NI KONDOLENCAS

Laŭ informo de k-do Bril Ivan Jakovleviĉ k-do **V. G. Kotelevcev** nia sindona peranto en Ĥarkov, USSR jam forpasis. La pasinto multe helpis nin en niaj laboroj per vastaj varbagadoj kaj estas ĉiam por ni karmemora.

Alian funebran informon portis al ni letero de D-ro C. A. Wulke pri forpaso de nia agema peranto por Brazilo s-ano **João Custódio Machado**, kiu estis aktiva esperantisto en urbo Tupaciguaro kaj mortis en sia floranta aĝo de 27 jaroj, en 13 julio.

Nian profundan kaj sinceran kondolencon al la familioj de la for-pasintoj!

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

### Du grandaj verkoj de ĉina medicino

“Ĉina Farmacia Vortaro” kaj “Receptaro de Ĉina Medicino”, kiuj kune ampleksas pli ol 27,000,000 da ĉinaj ideografiaĵoj, estas finredaktitaj kiel malneto, fare de la profesoroj kaj studentoj de la Nankina Ĉinmedicina Kolegio. La unua verko enhavas entute pli ol 5,000 medikamentojn, ĉirkaŭ ses milionoj da ideografiaĵoj, kaj en la dua estas kolektitaj pli ol 115,000 receptoj nuntempaj kaj antikvaj.

### “Edenon Ni Starigos sur la Tero”

Jen estas filmo, kies titolo estas verso de Heine, nun farata en kunlaboro de studioj de dokumentaj filmoj de Ĉinio kaj de G.D.R. Ĝi estos samtempe por ekranoj vasta kaj malvasta. Ĝia enhavo respegulos la fortikan unuiĝon de la socialisma tendaro, la interhelpadon politikan, ekonomian kaj kulturan kaj la intiman amikecon inter Ĉinio kaj G. D. R. kaj iliajn rapidegajn

ŝanĝiĝojn en la pasintaj dek jaroj post la fondiĝo.

La filmo komenciĝas per la interamika aktivado inter la lernantoj de W. Pieck-klaso de la 65-a Gimnazio de Pekino kaj la germanaj geknaboj en Pekino. Kaj “Odo al Ĝojo (*An die Fraŭde*) de F. Schiller el la *Naŭa Simfonio* de L. Beethoven estos alprenata kiel pompa muzika fono ĉe la fino de la filmo.

### Filmo pri argilstatuisto Ĝang

La arto knedi argilajn statuojn de la kvar generacioj de la famaj popolaj artistoj Ĝang-oj estas filmigitaj kolore de la Centra Studio de Dokumentaj Filmoj. La filmado komenciĝis en majo. Estas fotitaj la artkreaĵoj de Ĝang Ming-ŝan, la loĝejo de Argilstatuisto Ĝang en Tiangin. La filmo ankaŭ priskribis la atenton kaj prizorgon de la registaro pri lia arto post la Liberiĝo, kaj la prelegadon de Ĝang Ging-hu de la tria generacio de Argilstatuisto Ĝang

en la Centra Kolegio de Industria Arto, Pekino.

La knedado de kolora argilstatuo de Argilstatuisto Ĝang jam havas historion de pli ol 120 jaroj. Laŭdire Ĝang Ming-ŝan, la fondinto, ofte knedis argilan statuon en teatro de Pekina opero laŭ modelo de sia ŝatata aktoro. Li pretigis siajn artaĵojn en la maniko sen scio de aliaj, antaŭ ol la dramo estis finludita. Kaj lia kreaĵo redonis la precizan vivsimilan figuron de la origino. La kreaĵoj de Argilstatuisto Ĝang fariĝis valora parto de ĉina popola metiartaĵo.





La kunvenon ĉeestis la estraro de VPEA kaj reprezentantoj de la E-Klubo de la ĉefurbo. K-do Dào Duy-Ky, vicprezidanto de VPEA malfermis la vesperan solenajon, parolante pri la grava rolo de la Dua Internacia Konferenco de MEM kaj de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. Li substrekis aparte la urĝan taskon de ĉiuj vietnamaj geesperantistoj en la batalo kontraŭ la militema imperiismo, malamiko de l' Paco kaj de Esperanto, kaj precipe en la batalo por patruja reunuiĝo.

## Ĉina ŝtata jurnal-servo informas pri 44-a UK

Pri la 44-a Universala Kongreso okazigita en Varsovio, la ŝtata jurnal-servo "Hinhua novajagentejo" sendis apartan informon je la 3-a de aŭgusto kaj ĝi aperis en pluraj grandaj tagjurnaloj en Ĉinio. Sur la Guangming-jurnalo, unu el la plej grandaj jurnaloj en Pekino aperis ankaŭ speciala artikolo pri tiu ĉi kongreso.

## Indonezia Esperantisto en Pekino

S-ano Kho Khwatliat, vicprezidanto kaj sekretario de Indonezia Esperanto-Asocio, estas varme akceptita en Pekino survoje de sia hejmlando al Varsovio por partopreni la 44-an UK. Li alvenis Pekinon je la 28-a de junio, kaj je la 2-a de julio Ĉina Esperanto-Ligo aranĝis por li agrablan renkontiĝan vesperon. Krome, dum lia restado en Pekino, unu el la laborantoj de ĈEL ankaŭ lin gvidis viziti kelkajn belajn pejzaĝojn, konstruejon kaj unu popol-komunumon.

## Ankoraŭfoja adiaŭo al nia hungara amiko

K-do J. Kiraly, nia hungara esperantista amiko, jam trifoje vizitis nian landon kaj ĉiufoje ĝuis grandan amikecon de ĉinaj esperantistoj. Li partoprenis preskaŭ ĉiujn kolektivajn agadojn de Pekinaj esperantistoj kaj multe instigis lernadon de esperantistoj-komencantoj. Sed post pli ol unu-jara restado en Ĉinio, jen li denove devis reiri al sia patrolando. Por lin adiaŭi ankoraŭfoje Ĉina Esperanto-Ligo aranĝis por li tekunsidon post-

tagmeze je la 8-a de julio. Li kaj lia edzino bonhumore kaj intime forbabilis la tutajn horojn kun Pekinaj esperantistaj amikoj, kiuj esprimis la esperon ke ni havos la ĝojon lin bonvenigi la kvaran fojon, kaj li same tion deziresprimis.

## Disdono de premioj al novaj geesperantistoj en Hanoi, Vietnamio

Dimanĉe vespere 26-VII-1959 en Liceo Tây-son, Hanoi, okazis solenajo organizita de VPEA (Vietnama Pacdefenda Esperantista Asocio) por disdono de premioj al novaj geesperantistoj, kiuj jus faris brile sian ekzamenon de finstudo en 3 kursoj: 24 diplomitoj en ele-

La premio konsistis plejparte el Esperantaj revuoj, kiel "Nuntempa Bulgario", "El Popola Ĉinio", "Paco" kaj verdstelaj insignoj. . . En la nomo de ĉiuj nove sukcesintaj ekzamenitoj, k-do Tràn Quôc-Dich kaj k-ino Vu Minh-Tâm esperantlingve esprimis sian dankemon al la

## MALALTIGO DE ABONPREZO

Dank' al helpoj de niaj amikoj en diversaj landoj ni povas konstati kun ĝojo, ke niaj abonantoj kreskis dum la kuranta jaro. Tio ebligas al ni eldoni en 1960 la gazeton "El Popola Ĉinio" kun la sama amplekso, sama ofteco kaj sama papero, sed kun nova pli favora tarifo. Ni esperas ke niaj amikoj kaj perantoj bone utiligos tiun ĉi kondiĉon por varbi vaste novajn abonantojn kaj havigi al ni adresojn por sendi specimenojn. Tio certe multe helpos por plia bonigo de la gazeto kaj kontribuo al la movado.

### La Nova Tarifo de E.P.Ĉ. por 1960-jarabono:

Anglio:	5 ŝil.	Jugoslavio:	300 din.
Aŭstralio:	6 ŝil.	Kanado:	1 dol.
Belgio:	34 B. Fr.	Nederlando:	2.50 gld.
Brazilo:	80 Kr.	Norvegio:	5 N. Kr.
Danlando:	5. D. Kr.	Nov-Zelando:	5 ŝil.
Finnlando:	250 F. M.	Sovet-Unio:	6 Rb.
Francio:	350 Fr. fr.	Svedio:	3.50 sv. Kr.
Germanio-okc.:	3 DM.	Svesio:	3 sv. Fr.
Italio:	420 Lir.	Usono:	1 dol.
Japanio:	250 Yen		

La Redakcio de "El Popola Ĉinio"

gvidantoj de la kursoj. Iliaj eldiraĵoj estis emociaj, kaj sufiĉe fluaĵ, je granda miro de la ĉeestantaro.

Sekvis alloga muzikprogramo, aranĝita de junaj amatoroj simpatiantaj nian Esperantan aferon.

VPEA

### El Leningrad en USSR

De tago al tago kreskas nia movado en nia lando, Kutime la kursoj, rondetoj organiziĝas ĉe domoj de scienculoj, kluboj kaj lernejoj. En nia urbo ekzistas Esperanto-sekcio ĉe la Domo de scienculoj, ĉe tre granda klubo "Domo de Kooperacio". Krom tio ekzistas gejunula asocio "Aŭroro", Esperanto-societo de la blindaj, rondetoj ĉe Domo de junaj pioniroj, ĉe Domo de instruistoj ĉe kelkaj uzinoj, oficejoj kaj lernejoj.

Nia sekciestro estas malnova kaj maljuna esperantisto S. Obruĉev, la fama akademiano. Ni eldonis ruslingvajn "Bul-tenon" kaj lernolibrojn. Nun ni preparas la eldonon de Esperanta-Rusa Vortaro. La eldono por unu numero de "Paco" estas ankaŭ konsiderata.

Por celebri la Z-jaron ni planis, krom la suprediritajn, varbi komencantojn ne malpli ol 1,000, propagandi per radio kaj televido, sub helpo de la asocio "Scio" organizi serion de lekcionoj pri Esperanto, organizi rondetojn en kelkaj uzinoj fabrikoj kaj lernejoj kaj aranĝi korespondajn kursojn.

OSKAR GARDI

### El Kaunas en USSR

Okaze de Zamenhofa 100-jara datreveno, esperantistoj en nia urbo kune kun "Asocio por Disvastigo de Politikaj Sciencaj Scioj", aranĝis sep publikajn

prelegojn pri internacia lingvo Esperanto. Krom tio al ni sukcesis aranĝi en ejo de Respublika Biblioteko, Esperanto-ekspozicion, kiu funkciis ekde 6-a ĝis 25-a de marto. Ĝin vizitis pli ol 1,500 personoj, el kiuj multaj skribe esprimis, ke ili ekvidis okulfrapan uzeblecon kaj utilon de Esperanto kaj promesis nepre baldaŭ komenci lerni Esperanton.

Preskaŭ simila Esperanto-ekspozicio estis aranĝita en Vilnius en ejo de Asocio por Disvastigo de Politikaj kaj Sciencaj Scioj. La Ekspozicio estis eĉ filmita de la Litova Ŝtata Kino-Studio por kinokroniko.

VEBELIUNAS ALBINAS

### Esperanto utiligata de polaj sciencistoj

En septembro de kuranta jaro okazos sinsekve en Krakovo de

### Atentu, muzik-amantoj kaj komponistoj!

"Amika Servo"—Tutmonda Korespondkaj Kolektant-klubo de Esperantistoj kaj Esperanto-Amikoj ĉe la enhavoriĉa, ilustrita pollingva semajnaĵo "KULISY" (eldonkvanto 300,000 ekz.), kiu publikigas la Esperanto-angulon sub la gvidado de K-do Mag. fil. Mieĉislav Zgorzewski deziras ricevi kolektojn aŭ apartajn specojn de naciaj kaj popularaj danckantetoj de samideanoj ĉiulandaj. Sendu viajn kantojn kun esperantaj vortoj (esperantigitaj). Ĉion adresu al "Mag. fil. Mieĉislav Zgorzewski, WROCLAW 2, skrytka poeztowa 22, Pollando. La sendintoj rekompence ricevos po du ekzempleroj de la verkaĵo.

Mieĉislav Zgorzewski

### Helpu la ekspozicion!

Por festi la 100-jaran naskiĝtagon de D-ro L. L. Zamenhof, ni okazigos La Unuan Kongreson de Indonezia Esperanto-Asocio je la 1-a ĝis la 7-a de decembro 1959. Dum la kongreso ni aranĝos ekspozicion, tial ni petas

alsendon de salutleteroj, pk, gazetoj, prospektoj kaj alia materialo el ĉiuj landoj. Antaŭdankon! Adreso: Indonezia Esperanto-Asocio, Pintu Besi 39, Djakarta, Indonezio.

### Internacia Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj

Por festi la Zamenhof-jaron kaj disvastigo de nia lingvo ni decidis okazigi en nia urbo Internacian Ekspozicion de Infandeseĝnaĵoj. Ni esperas, ke Esperantistaj instruistoj kaj lernejestroj en ĉiuj landoj sendos al ni la bezonatajn desegnaĵojn:

La desegnaĵoj estu farita sur bona blanka papero, kun formato 10 × 15 ĝis 20 × 30, kaj notu sur la dorso nomon, sekson, aĝon, gepatrojn, adresojn, lernejon kaj gradon.

Ĉiuj partoprenantoj ricevos memorajojn kaj la plej bonaj premiojn.

Ĉion sendu urĝe (se eble aerpoŝte) al:  
SEMANTOJ, ESPERANTISTA  
SOCIETO, CAIXA POSTAL 68  
TUPACIGUARA-MG-BRAZILIO

Pollando du internaciaj geodeziaj konferencoj: t.e. la Kunsido de Permanenta Komitato de Internacia Federacio de Geometroj (4-7-a sept.) kaj Internacia Kolokvio (Scienca Kurso) de Geodeziaj Kalkuloj (9-13-a, sept.). Nun la Sciencoteknika Asocio de Polaj Geodeziistoj kaj la Geodezia Komitato en Pola Akademio de Sciencoj dissendis Esperantajn alvokojn al esperantistaj geometroj, geodeziistoj kaj astronomoj, ke ili partoprenu la aranĝojn de tiuj konferencoj. En la organo de la Geodezia Komitato estis presitaj krom alilingvaj klarigoj pri tiu ĉi kolokvio, ankaŭ Esperanta.

### **Esp-a disaŭdigo en Pollando**

Laŭ informo de Pola Radio ĝi elsendas ĉiutage duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25.05 m., 25.20 m., 25.29 m., 30.98 m., 31.45 m., 31.50 m., 51.12 m., kaj sur la meza: 249 m. de la 13.30 h. de mezeŭropa tempo. Dum la 44-a UK en Varsovio ĝi disaŭdigis ankaŭ ampleksajn komunikojn pri la kongreso. Sugestoj kaj rimarkoj estas petataj de la Radio. Ankaŭ raportojn pri progreso de E-movado oni deziras. Ĉion sendu al "Pola Radio, Esperantaj Disaŭdigoj, VARSOVIO, Pollando".

### **Unua Kongreso en Indonezio**

Esperanto-movado en Indonezio lastjare kontentige progresas, kaj Indonezia Esperanto-Asocio ludas gravan rolon por prospero de Esperanto-movado en Suda Azio. Por celebri la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof, IEA decidis okazigi unuan landan kongreson en Bandung en venonta decembro. Riĉa programo por la kongreso estas aranĝota. Krom gravaj prelegoj pri Esperanto-movado oni trovos en ĝi ankaŭ gajajn orientajn artvesperojn kaj ekskursojn al belaj lokoj en Indonezio. Al tiu kongreso IEA kore invitas delegitojn de Esperantaj asocioj kaj esperantistojn en la tuta mondo. Sin anoncu al "Indonezia Esperanto-Asocio, Pintu Besi 39, Djakarta, Indonezia".

### **"Kiu estas kiu" en E-movado**

Por iom vaste konigi la aktivulojn en nia movado, la eldonisto J. Régulo Pérez planis eldoni libron kun la supra titolo. Ĝin redaktas S-ro Hans Jakob, estinta direktoro de UEA. Por ke ĝi estu laŭeble kompleta, la redaktoro petas helpojn de ĉiuj Esperantaj organizoj, ke ili sendu al li koncizajn, sed nepre fidindajn informojn pri pasintaj pioniroj kaj nuntempaj aktivuloj,

kiuj iel koninde kontribuis al nia movado. Estas petate, ke la informoj enhavu jenajn punktojn:

Nomo(j)—antaŭnomo(j), eventuale pseŭdonimo(j),

Dato (tago, monato, jaro) kaj loko de naskiĝo, ev. de morto.

Studo(j), ev. ankaŭ ŝatokupo(j).

Civila kariero, laboro, kutimaj okupiĝoj.

Agado por Esp-o, kun precizaj indikoj pri lokoj, jaroj ktp.

Verkaro, kun indiko de kompleta titolo de la pecoj, loko kaj jaro de eldono, ev. numero de eldonoj de ĉiu peco kun pli ol unu.

Notindaj apartaĵoj aŭ aldonajoj.

Ĉio en konciza, telegrafa, leksikona maniero, sed sufiĉe klare. La tekston, ĉe plej konataj gravuloj, akompanu bona pasportforma bildo por ornami la biografieton. Ĉion sendu al "S-ro Hans Jakob, Palais Wilson, GENEVE, Svislando".

### **El Nederlando**

En la kadro de la Zamenhof-jaro la nederlanda Esperantistaro streĉas ĉiujn fortojn. E-fektive menciinda estas grava sukceso koncerne la instruadon.

## **Al legantoj de El Popola Ĉinio en Sovet-Unio**

Junulara Esperantista Grupo "Fajrero" kaj Esperantista Rondo ĉe Granda Soveta Enciklopedio organizas

### **Traduk-konkurso**

Se vi deziras partopreni ĝin, traduku unu el artikoloj, montritaj sube, kiujn vi trovos en ĉi numero de nia gazeto.

Sendu la tradukon al jena adreso: Moskva, poŝtkesto 1004, Esperanto, Raisa Goldberg (traduk-konkurso).

La tradukoj estos ekzamenataj kaj korektataj de spertaj esperantistoj. Ĉiu tradukinto ricevos recenzon.

Plej bonaj tradukoj estas premiataj per valoraj libroj.

**Unua tasko:** *Ĉajvang kaj demono* (paĝo 179)

**Dua tasko:** *Nekonata gasto* (paĝo 165)



Urba ĵurnalo en Hago ĉiun semajnon enpresas Esperantolecionon. En tiu skriba kurso partoprenas pli ol 1400 personoj. Dume, dum publika leciono en salono de la zoologia ĝardeno ĉeestis pli ol 2000 gekursanoj kun parencoj sininteresantaj. La nacilingva ĵurnalaro ofte favore al Esperanto aŭdigas sian voĉon

publikigitan per mallongaj artikoloj kaj notoj.

Plurfoje okazis dutagaj kunvenoj kiel studkonferenco kaj semajnfina renkontiĝo. Same plensukcesis Beneluksa Kongreso en Harlema, dume oni fiksas jam datojn por okazigi t.n. trilandajn renkontiĝojn inter reprezentantoj de la belgaj, ger-

manaj kaj Nederlandaj esperantistoj.

A. A. LEENHARD

### Plia strato "Esperanto"

En Sicilio, urbo Ragusa dediĉis novan straton al Esperanto sub instigado de s-ano Josefo Stanislao Boscarino, delegito de Itala Esperanto Federacio por la tuta Sicilio.



## Sur Nia Librobreto

**Bofilino**—Romano de fama bulgara verkisto Georgi Karaslavov, tradukita de Simeon Simeonov kaj Asen Simeonov, bindita, 327 paĝoj sur bona papero kun formato 12 × 17 cm, kaj 12 belaj ilustraĵoj de Boris Angeluŝev Ĝin eldonis: Fremdlingva Eldonejo de Bulgario en Sofio.

Min kaptis vere granda intereso, kiam mi legis ĉi tiun libron. Ĉar en plejparto de la unuarangaj Esperantaj verkoj ja troviĝas tre malmulte da verkoj priskribantaj problemojn aktualajn, ke oni el ili ne nur ĝuas belan literaturon, sed ricevas ankaŭ profundan komprenon pri la nuna mondo. Tiu ĉi libro kontentigas ambaŭ postulojn. Mi trovas en ĝi socion tiel familieran en malnova Ĉinio, ke mi kvazaŭ denove aŭdas la plendon kontraŭ la ekspluatado de la bienposedantoj kaj diversaj krimoj devenantaj el la ekspluatado.

La aŭtoro ne fabrikis en la romano ian sensacian intrigon sed nur rakontas la ĉiutagan vivon de la bienposedanto Jurtalan. Li estis tiel avida al riĉaĵoj, ke pro tio li ĉiutage kverelis kun la kampservistoj

persekutis ĝismorte knabon ŝtelintan liajn maizospikojn, eĉ fakte mortigis sian propran filon. Li ne multe parolis sed nur kalkulis kaj kalkulis. Li estis membro de iu partio de sia klaso, sed li partoprenis politikajn agadojn nur kiam liaj propraj interesoj estis tuŝitaj kaj li volis serĉi apogon de la politiko. Ĉu tia figuro maloftas en la mondo, kie regas absolute Mamono?

Krome, la aŭtoro ankaŭ funde priskribas la elreviĝon de malriĉa knabino Zevda, kiu "bonŝance" akiris la amon de la filo de la bienposedanto kaj fariĝis hofilino de la bienula familio. Ŝi, ankaŭ ŝiaj gepatroj, fieris pri tiu ĉi sukceso. Kiam ŝi iris surstrate pompe vestite, ŝi ĉiam tenis sian kapon levita kun koro plena de ĝojo aŭdante la flustron, ke tiu ĉi estas bofilino de Jurtalan. Tamen fakte ŝi estis nur senpaga kamposervistino de la familio, kaj kiam ŝia edzo mortis sub la "patra" turmentado, ŝi do devas ankaŭ esti forpelta, la familio tute ne zorgis ŝian vivon kaj estontecon.

Tiu ĉi libro kompreneble rakontas la staton antaŭ la agra-

ra reformo en Bulgario, ĝi do bone helpas al la legantoj kompreni la malnovan Bulgaron. Tamen sendube al multaj legantoj la fenomeno estas ankoraŭ aktuala, ĝi do prezentas al ili ankaŭ pripensindan problemon. La lingvo estas flua kaj senriproĉa. Plejparto de bulgarismaj vortoj kaj esprimoj estas klarigitaj ĉe la fino. Aparte rekomendindaj estas la ilustraĵoj. Ili simplaj kaj vivecaj, formis vere serion de altvaloraj artaĵoj.

Honfan

**Amika Vietnamio**—prozo de Len Fox, Aŭstralia verkisto iam vizitinta Vietnamion, tradukis Dao-Anhkha kaj Nguyen Ming-kinh, kaj eldonis la Fremdlingva Eldonejo en Hanoi, 1959. 183 paĝoj, broŝurita kun formato 12 × 18 cm. Prezo: 3 rubloj aŭ 0.75 US\$, aĉetebla ĉe SO XUAT NAHP KHAU SACH BAO, 32 Hai Ba Trung, Hanoi, Vietnamio.

Post "Skizo pri Vietnamio" nun eldoniĝis dank' al klopodado de niaj vietnamaj kamaradoj tiu ĉi nova libro por iom amplekse konigi Vietnamion, al esperantistaj legantoj.

Rimarkinde estas tio, ke ĝi ne estas verkita de vietnamo sed de alilandano. Tio ebligis al ni vidi kiel Vietnamio aspektas objektivite al eksterlandanoj. Kaj kio plej okulfrapas al ili. Vere la verkinto donas al ni plej koncize kaj plej amplekse raportojn pri ĉiuj aspektoj de

la nova Vietnamio, kiu longajn jarcentojn suferis de la invado de fremduloj, eĉ nun ĝi ne estas tute liberigita. La libro estas dividita en 14 ĉapitroj, kaj ĉiu ĉapitro okupiĝas pri aparta temo. Tamen el la tuto oni ricevas plenan bildon pri vivo kaj progresoj kulturaj, politikaj, agrikulturaj, industriaj, religiaj, minoritataj kaj pachtatalaj. Ankaŭ pri folkloro kaj amikeco al eksterlandanoj la verkinto donas merititan akcenton.

La verkinto aranĝis siajn materialojn per eleganta stilo kaj tre interesa maniero. Tial ĝi estas vere leginda por tiuj, kiuj malmulte scias pri tiu nove liberiginta lando.

La traduko estas klara kaj sufiĉe redonas la vivecon kaj allogecon de la originalo. Tamen la teksto ne estas tute rafinita. En la unuaj ĉapitroj oni trovas malĝustajn diskutindajn esprimojn. Ekzemple, la tradukinto ofte uzas akuzativon senbezone: "laŭlonge la ŝliman vojon" anstataŭ "laŭlonge de la ŝlima vojo", "dume someron" anstataŭ "dum somero", "ĝis la ĉielon" anstataŭ "ĝis la ĉielo". Sufiĉe konfuza ankaŭ la uzado de "da": oni trovas "la nombro da bubaloj" anstataŭ "kelkaj bubaloj" (ankaŭ "la" tie ne necesas.) "li kunportis da seka pajlo" anstataŭ "li kunportis iom da seka pajlo", "ŝi ne havis da libroj" anstataŭ "ŝi havis

neniom da libroj", mankis da lirika kaj sentoj" anstataŭ "al la lirika kaj humanaj kunmetitaj vortoj trov nekutimaĵoj, ekz. "laŭdire" la traduko "laŭnondire" ktp. Tamen malgravaj neniel signifon kaj intereson libro.

**Esperanto-Latviešu un Esperanto Vardnica**  
Esperanto-Latva kaj Esperanta, kun klara gramatiko de Esperanto paĝoj kun formato 10x15 cm. kompilita de k-doj kaj A Gutmanis kaj eldonita de Latve Ŝtata Eldonejo

\*\*\*\*\*

## Korespondi deziras

**Oskar Gardi**, USSR, Leningrad-P-183, ŝkolnaja 2, K 18 — dez. kor. pri temoj: E-movado, teorio, praktiko, historio kaj interŝanĝi E-lernolibrojn, vortaretojn, E-ajn kaj lokajn bildojn kaj vidaĵojn.

**K-do Valeriano BLASQUEZ** Hospital ARGELES - GAZOST (Pyr.) Francio, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj kaj interes. uzitajn p.m.

**Prof. Konrado ĈERRI** dez. ricevi mankantajn numerojn (1958 n-roj 1. 2. 6.) de EPĈ por kompletigi sian kolekton. Kiu volos lin helpi, adresu al Prof. Konrado ĈERRI, Poŝta Kesto n. 159, BIELLA Verĉelli, Italio.

**Radka Ĉukanova**, str. "Gurka" 19, Kazanlâk, Bulgario, 20-jara junulo, dez. kor. kaj interes. modjurnalojn, filmorevuojn.

**Ary Melo**, Caixa Postal 252, Fortaleza Ceará, Brazilo, 19-jara medicina lernanto, dez. kor. kun 14-18-jaraj ĉinaj fraŭlinoj per leteroj kaj interes. pk. kaj fotojn.

**Hristo Tonev**, str. "P. Volov" 32, Kolarovgrad, Bulgario, dez. kor. kun ĉinaj kaj japanaj s-anoj, kaj ankaŭ kun aliaj aziaj landoj.

**Demeter Denes**, Budapeŝt, XXI., Hatâr-u 85, Hungario, dez. kor. kun ĉinaj, japanaj kaj hindaj gesamideanoj pri pentrarto, literaturo kaj budhista religio.

**Nguyen Van Lai**, 22 str. Nguyen binh Khiem, Hanoi, Vietnamio, 19-jara fraŭlo, dez. interes. pk, pm, bk, librojn kaj gazetojn, kaj kor. pri ĉiuj temoj kun la tuta mondo.

**S-ino Halina Nawojkska**, Bydgoszcz, str. Długa 37 p. 24, Pollando, dez. kor. kun ĉinaj kaj aliaj orientaj geesp-istoj pri naturo kaj muziko, interes. pm kaj belajn pk. Validas ĉiam.

**Ladislav Kralovec**, Poŝtkesto 56, Plzen 1, Ĉeĥoslovakio, 35-jara konduktoro dez. kor. kaj interes. bk. kun ĉinaj kaj aliaj orientaj landoj.

**Leon Geron**, Sofio, 16, Bulgario, dez. kor. pri hindaj, koreaj, vietnamaj, indoneziaj esp-istoj.

\* **E-rondeto de inĝ. toj** volas kontakti kun vietnamaj studentaj Niaj membroj dez. kontakti tutmonde, precipe pri temoj. Adr.: USSR Kaunas 6, KPI-Esp-istoj

\* **K-do inĝ. Azarij** dez. ricevi Plenan Vortaron. Rekompenc ziro de la sendinto. O urbo Barnaul, str. 21 n-ro 17-V, kv. 3.

\* **14 Bulgaraj gekurgistinoj** kaj kuracisto kun ges-anoj en Azia kaj landoj pri diversaj inkluzive interes. de zka, Adresu al: instru **P. Nikolov**, ul. M. Kolarovgrad, Bulgar

\* **Vladimir Belajev** dramteatro, dez. kor. art-kartojn, p.m., il. resp. garantiata. A Nord Kalkaz, Grozni aeva, 3/30 kv. 38.

